HUNGARA VIVO

5
1980
11,–Ft

KONDIĈE DE SUFIĈAJ SINANONCOJ ANKAŬ ESPERANTE!

Internaciaj Komputadaj Kursoj en Budapeŝto 1981

Kurso	Dato	Lingvo
Gvidadaj sistemoj	marto 30/ aprilo 3	angla
Datum-modelado (praktikado)	aprilo 6/10	rusa
Projektado de efika datumbazo (praktikado)	aprilo 13/17	rusa
Evoluitaj metodoj de programad-direktado	majo 4/8	angla
Strukturita program-projektado per metodo Warnier (praktikado)	majo 11/15	angla
Strukturita program-projektado per metodo Jackson (praktikado)	majo 18/22	angla
Efika strukturita programado en COBOL (praktikado)	majo 25/29	angla
Strukturita sistem-organizado (praktikado)	oktobro 5/9	angla
Direktado de evolugo de perkomputilaj inform-sistemoj	oktobro 12/16	angla
Programado sur altnivela makro-asemblila lingvo (praktikado)	oktobro 19/23	angla
Konkurenta programado	oktobro 26/30	angla
Retoj, kiel rimedoj de distribuita datumprilaborado	novembro 2/6	angla
Aparataraj kaj programaj arkitekturoj en la distribuita datumprilaborado	novembro 9/13	angla
Distribuita datumprilaborado	novembro 16/20	angla
Programar-evoluigado por mikrokomputilaj sistemoj	novembro 23/27	angla

La kursoj okazos en la angla aŭ la rusa lingvoj, laŭdezire ni ce rtigas samtempan interpretadon. Surbaze de la sukcesoj de la pasintaj jaroj ni daŭrigos la komunajn kurs-organizadojn kun la instituto Control Data Institute (Usono). La lingvo de lakursoj estas la angla.

Ni petas vin skribi en via inform-petanta letero vian laborejon, profesion, postenon, poŝtadreson, pri kiuj kursoj vi petas informojn kaj kiu el la kursoj vin inte resas Esperantlingve.

Internacia Komputada Eduka kaj
Informa Centro (SZÁMOK)
Kunordiga sekcio
Budapest 112 Pf. 146
H—1502
Hungario
Telefono: (36) (1) 853-111
Telekso: 22—4498

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Eeperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H—1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H—1368
Aperas dumonate
XXa jaro, 1980 n-ro 5
(93)

ENHAVO

Aczél, Gy.: Por la ordo de la libero (P. A. R.) 162
Hilarová, D.: Budapeŝta romanco (J. *Marik)* 164
Kalocsay, K.: Poemoj el „Tutmonda Sonoro" 166
Knichal, O.: Militfino 168
Kökény, L.: Kiel realiĝis la Enciklopedio de Esperanto? 169
Fejes, M.: Lajos Biró en la vico de niaj centjaruloj 170
Biró, L.: La helo (J. *Podani)* 171
Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 17. 172
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 9. (P. A. R.) 174
Long, K.: Post vespero de hungara poezio 175
Dobai, P.: Elsuĉilo (D-ro I. *Nagy)* 177
Farkas—Tatár, É.: Panoramo 180
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 183
Gergely, M.: Zoltán Váli 185
D-ro *László*, F.: Budapeŝto, urbo de banejoj (E. *Fenyvesi)* 186
Blok, A.: Dek du (N. Nekrasov, B. *Tornado)* 192
Bálint, Sz.: La sorto de la bankrabisto 194
E. F. Gaja paĝo 195
Mihalkov, G.: La vitrino 197
Nemere, I.: La frenezulo 197
Paĝo de komencantoj (I. *László)* 199
Leterkesto 200
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 200

Sur la titolpaĝo: Aŭtunaj briloj en la arbaro Bakony

La nuna numero...

certe plaĉos al ĉiuj literaturamantoj, ja beletro ricevis aparte multan spacon en ĝi. Tamen, unue ni tuŝu ĉi tie la prikulturan artikolon de György *Aczél*, ĉefa gvidanto de la hungara kulturpolitiko. Tre klare li eksplikas la principojn, surbaze de kiuj evoluas la hungara kulturo jam ĉirkaŭ dudek jarojn, kun rezultoj vere atentindaj. Lia artikolo certe interesos niajn legantojn, kiuj havas certagrade specialan rilaton al la hungara kulturo; kaj eble estas superflue memorigi, ke finfine ankaŭ la Hungarlandajn kadrojn de la Esperanta kulturmovado difinas la principoj de la sama kulturpolitiko.

En tiu ĉi numero ni finas la publikigon de la longa poemo *Dek du*, per kiu ni volas omaĝi al la 100-a datreveno de la naskiĝo de *Blok*, kaj samtempe ankaŭ al la 63-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, kiu inspiris tiun poemon. Alia omaĝato estas la hungara verkisto Lajos *Biró*, el kies verkaro ni elektis interesan novelon. La pli moderna rakonto — *Elsuĉilo* — de P. *Dobai* eble ne plaĉos al ĉiuj, tamen estas konsilinde repensi ĝin, antaŭ ol formi definitive negativan opinion.

Pluraj kontribuaĵoj alvokas la atenton pri kelkaj libroj, eldonitaj de Hungara Esperanto-Asocio. Tutpaĝa reklam-specimeno el la nova bildrakonto, *La Faraono* de *Prus*, celas veki vian apetiton pri tiu agrabla kaj facila legaĵo. (Kursgvidantoj, utiligu ĝin!)

Lajos *Kökény* artikolas pri la naskiĝo de *Enciklopedio de Esperanto*, ĝis nun nesuperita ĉefverko de la esperantologia literaturo. Ĵus aperis fine ĝia represo, ebliganta al ĉiuj interesitoj detale studi la historion de la unua heroa duonjarcento de la Esperanto-movado.

La represo de la *Enciklopedio* estis grava plenumo de Hungara Esperanto-Asocio, kiun venontjare sekvos alia, ne malpli grava kaj granda fortostreĉo: eldono de la mondliteratura antologio *Tutmonda Sonoro*, tradukita el 30 lingvoj fare de Kálmán *Kalocsay* — kiel la ĉi-numeraj specimenoj montras — *almenaŭ perfekte.*

Kaj fine ni revenu al temo, kiu ofte estas tuŝata sur tiu ĉi enkonduka paĝo, tamen maleblas eviti ĝin ankaŭ nunfoje. Ĉu vi jam renovigis vian abonon por 1981? Kaj se plaĉis al vi nia revuo, ĉu vi povis konvinki iun el viaj esperantistaj amikoj fariĝi abonanto dum la venonta jaro? Se ne, ankoraŭ vi povas fari tion . . .



György Aczél [Acel] (nask 1917) estas unu el la gvidaj figuroj de la hungara vivo socia, politika, kultura. Li aliĝis al la komunista movado en 1935, partoprenis la kontraŭfaŝisman agadon. Post 1945 li laboris en diversaj partiaj postenoj. En 1949 laŭ malpravaj akuzoj li estis prizonigita, en 1954 rehonorigita. Ekde 1956 G. Aczél estas ano de la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio, ekde 1970 li estas membro de la Politika Komitato de la CK. Inter 1957 kaj 1968 li estis la unua vicministro pri kulturo, inter 1967 kaj 1974 sekretario de la CK de HSLP, de 1974 estas vicprezidanto de la registaro.

György Aczél multe faris por la evoluigo de la hungara kulturo, li havis grandan rolon en la ellaborado de la kulturpolitiko hungara. Pri la principoj kaj problemoj de la socialisma kulturo li verkis plurajn artikolojn, faris paroladojn, publikigis librojn.

La jena artikolo estas koncizigita varianto de unu el liaj paroladoj lastatempaj.

György Aczél:

Por la ordo de la libero

La profesia scio, la kulturiteco, la erudicioj idea, morala kaj kultura nuntempe pli kaj pli iĝas ankaŭ faktoroj, formantaj la ekonomian situacion.

Kiel kompreni nun la rilaton inter la grundo ekonomiasocia kaj la kulturo, kiam oni devas kalkuli je malpli rapida evoluo ekonomia kaj pli malgrandskala kresko de la nacia enspezo, ol tiu, kiu estis kutima en la pasintaj jaroj. Se hodiaŭ en la fokuso de la socia vivo troviĝas la ekonomia agado, kiel tio influas kulturan vivon? Ĉu ne kondukos tio al la malgraviĝo de la rolo de la ideologia agado, formanta la kulturajn konscion, vivon, al la malvastiĝo de ebloj de la evoluiigo kultura?

Tiu ĉi demando eksonas pli kaj pli ofte, tial oni denove kaj denove devas ĝin respondi.

Ekzistas tiaj opinioj kiuj la postulojn pri ekonomiaj efiko kaj interesiteco, pri la racieco kaj pri la organiziteco teknika konsideras ne primaraj, sed ekskluzivaj, ili konsideras malgrava la rolon de la homaj, kulturaj faktoroj ne nur ĝenerale en la socio, sed ankaŭ en la produktado. Ili konsideras, ke la kulturo el la vidpunkto de la vastaj popolamasoj havas la nuran rolon: doni post la bonefika laboro forgesigan, amuzan distron.

Kiel ĉie en la vivo, tiu ĉi unuflanka starpunkto naskis sian antipodon. Tiun romantikan, moralisteskan, profetecan sintenon, kiu konsideras la kulturon unuavice „kontrauforto". Gi limigas la rolon de la kulturo esti spirita medikamento, ŝirmanta de la maŝiniĝo, malpliiganta ĝian deformantan efikon aŭ konsideras la kulturon kompensajo pri la materia malriĉo.

Ne estas pli bona la alia, laŭŝajne ĝusta opinio, kiu volas la unuigon de la du flankoj — mi intence uzos burokratisman esprimon — „aranĝi" pere de senprincipa kunigo. Kvazaŭ al la ekonomio, al la sociaj-produktadaj rilatoj, al la mondo de la „duraj faktoj" la kulturo kaj la ideologio donus la „socialisman pluson", la kvaliton homan.

La socialisma socio iras dupiede. Eĉ se la bezonoj ekonomiaj hodiaŭ starigas en la fokuson la problemojn de la produktado, eĉ se en tiu ĉi procezo sperteblas unuflankecoj ekonomiismaj, en nia socio la kulturo ĉiam estas nemalhavebla, hodiaŭ estas pli tia ol hieraŭ, morgaŭ estos pli tia ol hodiaŭ.

Verŝajne ne estas bezone longe vicigi faktojn pri la kultura leviĝo fare de nia popolo. Por doni karakterizon sufiĉas mencii kelkajn indikojn. Antaŭ kvardek jaroj en Hungario ĉiujare al ĉiu loĝanto iris po unu libro, nun iras po naŭ. La tiutempa libroproduktado enhavis amason da aĉajoj, senvalorajoj, sed hodiaŭ — kvankam troveblas ankoraŭ sufiĉe da suprajaj kaj malaltkvalitaj verkoj, la konsisto, la kvalito principe ŝanĝiĝis. En 1934 en nia lando oni 792 mil-ope vizitis la muzeojn kaj la ekspoziciojn. En 1978 jam tiu kvanto estis pli ol 16 milionoj. La loĝantaro pli aĝa ol dek jaroj pli ol 80 procente — kun plia-malplia efikeco — spektas la programon de la televido. La naŭ dekonoj de la loĝantaro estas regulaj aŭskultantoj de la radio-dissendoj, ĝiaj tri kvaronoj estas regulaj legantoj de la gazetaro. La nombro de la vizitantoj de la seriozmuzikaj koncertoj de 387 mil altiĝis ĝis pli ol 1 miliono. En 1958 estis venditaj 1 miliono 800 mil sondiskoj kun muzikverkoj, tiu nombro en 1978 atingis 7 milionojn.

Buntecon de la spektro de nia kulturo bone pruvas la tradukajoj. En nia lando ĉiujare estas eldonataj libroj de ĉirkau 300 eksterlandaj aŭtoroj en granda kvanto helpe de nemalgranda financa subteno ŝtata. Post la liberiĝo la hungaraj eldonejoj aperigis 106 volumojn de Lev Tolstoj en 2 milionoj 420 mil ekzempleroj. Dum la sama tempo la hungara legantaro aĉetis 148 eldonojn de verkoj de Gorkij en 2 milionoj 360 mil ekzempleroj, 85 eldonojn de verkoj de Thomas Mann en 1 miliono 860 mil ekzempleroj, 72 eldonojn de verkoj de Shakespeare en 1 miliono 200 mil ekzempleroj, 48 eldonojn de verkoj de Solohov en 1 miliono 175 mil ekzempleroj, 42 eldonojn de verkoj de Dickens en 1 miliono 200 mil ekzempleroj. La nombro de la vizitantoj de la publikaj bibliotekoj dum dudek jaroj altiĝis ĝis 5 milionoj.

Enorman kreskon montras la gazetkaj revueldonado. Antaŭ 1945 el la tri grandsignifaj literaturaj revuoj „Nyugat" aperadis (kun po 70—110 paĝoj en sia ora epoko) ĉiumonate en 1500 ekzempleroj, sed ĝenerale nur en 1000, „Kelet Népe", kun po 50 paĝoj aperis ankaŭ ĝenerale en 1000 ekzempleroj, „Szép Szó" kun 80—90 paĝoj ĝenerale en 800 ekzempleroj ĉiumonate. Nuntempe la paĝnombro de la literatura revuo „Kortárs" estas pli granda ol tiu de „Nyugat", de „Szép Szó" kaj de „Válasz" kune en la 30-aj jaroj.

Eble la plej sukcesa okaza eldonaĵo de la „tagoj de la libro" antaŭ la jaro 1945 estis la antologio „Koszorú" (Florkrono), eldonita en 1931, kiu havis furoron konsideratan tiutempe enorma: ĝi aperis en 15 mil ekzempleroj. La antologioj „Szép Versek" (Belaj Poemoj) kaj „Körkép" (Panoramo) — la unua versaĵa, la dua novela — en 1978 aperis en po 80 mil ekzempleroj, tamen ili dum kelkaj tagoj malaperis de sur la bretoj de la librovendejoj. La poemaro de Attila József „Nagyon fáj" (Ege Doloras) aperis en 1935 Kristnaske en 600 ekzempleroj, kaj nur 27 ekzempleroj estis venditaj en la librotendoj de la „tago de la libro" en 1937. En 1977 la duvoluma eldono. enhavanta la plenan verkaron de Attila József, aperis en 189 400 ekzem-

pleroj. La spezo de la 1979-jara Librofesta Semajno estis ĉirkaŭ 1 miliardo da forintoj.

La televido, la radio de tago al tago peras ankaŭ kulturvalorojn. En la lasta periodo la surekranigo de la Shakespeare-a „Reĝo Lear" havis la plej grandan sukceson inter la spektantaro de la televido, ĝin rigardis la plej granda publiko. Kvankam iuj recenzistoj plendis, ke la prezentado ne donis sufiĉe da novaĵoj, la plej grava afero tamen estas, ke milionoj konatiĝis kun ĉefverko de Shakespeare, kio estas granda akiraĵo.

La rezultoj de nia kulturo estas mezureblaj precipe ne pere de kvantaj ŝanĝoj. Ankaŭ ili estas gravaj, sed pli gravas la enhavo esprimata de ili, la kvalito: la leviĝoj mondpercepta, vidmaniera de la popolo. La rezultoj naskiĝis ĉefe pro la ĝenerala politiko de la Hungara Socialisma Laborista Partio, kiu inkluzivas la kulturpolitikon kiel organikan elementon, kontribuantan la konstruadon de la socialisma socio ĉefe pere de proksimigo de la popolo kaj la kulturo. Ni estas, restas kaj restos apertaj por ĉiu humana valoro, riĉiganta la socialismon, ni integrigas ĉiun valoron servantan al la homo, ie ajn kaj iam ajn ĝi naskiĝis en la kulturo de la mondo. Laŭ tiu ĉi principo ni ekagis antaŭ dudek jaroj kaj depost tiu tempo ni sekvas la saman politikon.

Ni subtenas ĉiun altnivelan bonan verkon de progresemaj ideoj kaj antaŭ ĉio ĉiun socialisman kulturvaloron. Ĉe ni ekzistas nek „sanktaj bovinoj", nek „deĵoraj geniuloj", ni kontraŭstaras la intrigadon, tiun ĉi malnovan tradiciaĉon de la kultura vivo hungara.

Ĉesigante la horizontmalvastigon fare de la „maldekstra" dogmismo, ni malfermis la vojon por ĉiu valoro de la hungara kaj monda kulturoj. Pere de tiu ĉi aperteco la socialista kulturo hungara iĝis pli riĉa.

Estas konataj niaj principoj pri la krea libero. Apud la primareco de la subteno de socialismaj, realismaj tendencoj, ni alte taksas ĉiun humanisman valoron, do ankaŭ la humanismajn valorojn burĝajn. Ni konsideras rajto kaj devo de la marksismaj socisciencoj kaj artoj la respondecan kritikon internan pri nia realo; ni akceptas la variecon de la stiloj. Neniam ni faris sekreton ankaŭ el tio ke ni memkompreneble malpermesas, ne enlasas ion ajn kontrauhoman kaj kontraŭsocian, ion ajn kio laŭrase klasigas la popolojn kaj la naciojn, kategorias ilin je superaj kaj malsuperaj, humiligas la homon, incitas militon, atakas la fundamentojn de la socialismo.

Ni scias, ke la varia tavoliteco de la kulturaj bezonoj havas la radikojn en la diferencoj troviĝantaj inter la laboroj, inter la vidmanieroj kaj inter la vivkondiĉoj. Tio nature ne signifas tion, ke sekve ĉiu — laŭ siaj bezonoj — pravas. Nia pravigita principo, sekvata jam dudek jarojn, estas, ke ni ne miksiĝas per potenca vorto en la demandojn de la stilo kaj gusto. Tiun ĉi principon ni ne rezignos ankaŭ estonte. En la aferoj de la gusto ni ankaŭ ĝis nun ne faris formalajn decidojn, guston de iuj personoj ni ankaŭ ĝis nun nek oficialigis, nek faros tion. El ĉio ĉi tamen erare estus konkludi, ke ni estas indiferentaj pri la stato de la publika gusto, difinita ankaŭ de mondpercepto, de moralo kaj de vivmaniero. Ni klare vidas, ke la postresto gusta estas grandparte peza heredaĵo. La fakto, ke de tio ni povas liberiĝi nur pene kaj malrapide, devigas nin labori kun trapensita planiteco kaj konscie, ni ne rajtas rezigni pri malpliigo de la ĉi-kampaj malaltnivelaj bezonoj kaj konservativismo, kiuj respegulas la transiran situacion socian kaj tial estas iomgrade naturaj.

Trarigardante la historion de nia kulturpolitiko, ni provas distingi tri ĉefajn periodojn. En la unua etapo de la revolucio kultura ni rompis la kulturmonopolon de la burĝaro; tiu procezo estis pli longedaŭra, ol la analogia procezo en la politika potenco. Sed jam tio estas finita. En la dua etapo grandaj amasoj konatiĝis kun la valoroj de la kulturoj hungara kaj tutmonda, milionoj iĝis apertaj al la ekkono de la valoroj. De tiu tempo aktualiĝis ankaŭ la tria fazo, en kiu la kulturo farigas kutima, nemalhavebla parto de la vivo de la individuo. La solvadon de taskoj de tiu ĉi periodo ni nature ankoraŭ ne finis. Ni ankoraŭ ne atingis, ke ĉiu volu kaj povu eluzi la eblojn, ke ĉiu alproprigu tiun kulturon, kiu estas nemalhavebla por la vivo de la homo socialisma, kaj al kiu lin aŭ ŝin la kapabloj taŭgigas. Ni ankoraŭ ne povis — kaj ni povos fari tion nur dum pli longedaŭra periodo — veki tiajn bezonojn, estigi tian retaron de instancoj kaj evoluigi la ekzistantajn tiel, ke la kulturo fariĝu elementa bezono por la tuta popolo, por ĉiu homo.

Estas sendube, ke ni faris grandegan vojon, ni solvis enormajn taskojn, sed ankaŭ tio estas vera, ke la farendaĵoj starantaj antaŭ ni ne estas malpli grandaj. Ĉiuj ĉi problemoj kaj ankaŭ la novaj devas esti rigardataj en la bonrezulta procezo de nia kultura revolucio, ili devas esti konsideataj sen nervoza hastado, sen pasiva rezigno.

Ni ne rajtas konsenti, ke spiritan nutraĵon, artan verkon aŭ tezokonceptojn faru tiaj, kiuj tiucele havas nek talenton, nek kvalifikon, foje nek diligenton. Estus senprincipe rilati al ili indulge, ĉar la rezulto estus, ke ĉefverkoj miksiĝus kun mezkvalitaj, kaj tiuj kun malbonaj kaj ne publikeblaj verkoj. Tia takto rilate al malkapablaj „kreantoj" estus maltakteco, misfaro al la publiko. La esenco de tiaspeca agado estus insulto kontraŭ la intelekto kaj la emocioj. Mi aldonas, ke krome oni elspezas monon de la socio, t.e. de la publiko por prezenti feblajn, eĉ malaltnivelajn „verkojn". Oni ja devas lukti kontraŭ la sentalenteco, aĉa mezkvaliteco kaj grizeco per sagaca rigoro pro la publiko.

Kiam ni akcentas, ke temas ne pri ia ajn kvalito, sed pri kvalito socialisma, ni ne intencas per tio rifuzi ion ajn de nia kulturo. Al la socialisma koncepto pri la kvalito apartenas sendube postuloj pri la profesia Valoro, pri la kompetento, pri la talento. La epiteto „socialisma" apud la vorto „kvalito" ne estas rifuzkaraktera, ĝi ne submetas artajn specifaĵojn al la taga politiko, ĝi montras sole la direkton.

Okcidente tiuj estas fanfaronitaj grandaj talentoj, eĉ verkistoj de internacia signifo, kies sola „verkista" ago estis ia supraĵa, sed opozicia raportaĵo, kio ne trovis ĉe ni eldoniston pro la absurda, ridinda enhavo. Politika kriemo aŭ griza mezkvalito neniun povas levi al nemeritita rekono.

Validigi la socialisman kvaliton signifas: akcepti la kulturan heredaĵon aperte al ĉiu vera valoro, kaj tiel krei novajn valorojn — por la bono de la socialismo.

Unu el niaj semajn-gazetoj antaŭnelonge meditis pri tio, ke krom la trio de „t": támogatás, tűrés, tiltás (subteno, tolero, malpermeso) ĉu ekzistas aliaj „t"-oj? Certe eblas alvicigi kelkajn tiajn, sed estas grave, ke en socialisma lando apud la tolero de subtenebla talento ne povas manki la „t" de tisztesség (honesto). Knut Hamsun vane estis talenta, Thomas Mann rifuzis kun li manpremi ĉar li iĝis servanto de faŝismo. Al la honesto apartenas krome, ke la artisto havu kuraĝon rifuzi tiujn, kiuj pridubas la homajn, socialismajn valorojn, kaj volas forĵeti ilin.

Por la ordo de la libero

Estus utile, se pri la kompreneblo de la arto, pri ĝia bone fundita kulturpolitika interpreto kreiĝus esenca interkonsento. Tio signifas, ke necesas pluaj intertraktadoj, diskutoj, kaj sur la kampo de teorio, kaj super la konkretaj verkoj.

La esprimo „komprenebla" estis intence uzata, kaj ne la esprimo „komprenebla por ĉiu", ĉar estas postulo primara, kvankam ne sola, ke verko entute havu homan signifon, ke ĝia kompreno estu inda kaj ebla. Se iu verko ne havas signifon, ĝi estas komprenebla nek facile, nek pene. Nur signifon havanta artaĵo povas veki eĥon spiritan, instigi al emocia kaj intelekta akcepto kaj konsiderado; la sensenco naskas konfuzon kaj reziston.

Oni ne devas atendi de la artaĵoj senkondiĉe kaj ĉiam tujan kaj plenan „sinmontradon", ke ili „donu sin" ankaŭ por ne-erudiciulo kaj sen enprofundiĝo. Post nelonga tempo iĝos klare: kiu estas tia verko, kiu havas signifon, kaj estas atentinda, por kiu indas lukti, kies enhavon ne eblus pli simple esprimi, pli kompreneble — aŭ kiu estas tia, por kies kompreno ne indas klopodi, ĉar ĝia komplikeco kovras nuran malplenon.

Troveblas kelkiuj, pledantaj nome de la tn. „ĝenerala gusto", kaj apelaciantaj al la ĝenerala kompreneblo, kiuj pro la distra bezono atendas de la arto simpligan vidmanieron, vulgarigan malprofundecon. Tiu ĉi opinio malutilas al la arto, ĝi malutilas al la publiko. Sed ne eblas forgesi alian opinion, kiu estas moda en niaj tagoj kaj laŭ kiu la kompreneblo entute ne estas kriterio de la artverko, eĉ tio ne, ke por iu ajn ĝi havu signifon. Ambaŭ opinioj efikas samdirekte: ili obtuzigas, atrofiigas la kapablon de la homoj pensi kaj kritiki.

La socialisma realismo ne estas senborda maro, sed estas neelĉerpeble riĉa, kiel la homo kaj la mondo. Guste tiel eblas, ke ĝi estu taŭga rimedo por arte rekrei la realon. Limigas koncepton de la socialisma realismo — ĝi aperu ĉu por ties „defendo", ĉu por diskrediti ĝin — kiu el la riĉo de la socialisma realismo forĵetas ekzemple la mondvidadon de Brecht, la groteskajn formojn de la mondvidado, la fantaziaĵon, ĝuste pridubas ĝian forton, ĝian validon.

La artistoj-socialistoj, kies nombro multoble superas tiun de la partianoj, ne estas nekritikeblaj. Nature, ankaŭ la partia libreto ne garantias maleraremon, ni ne rajtas cedi el la postulo de la ideologia-arta kvalito. Nuntempe la problemon kaŭzas ne tiom la „maldekstrula" pritakso de la socialismaj artaĵoj, sed alia pretendo. Tiu, kiun karakterizas formalisma, burĝa koncepto pri la valoroj kaj tia gusto. Surbaze de la marksismaj filozofio kaj estetiko. surbaze de la riĉa valoraro de la socialisma kulturo ni diskutas pri la kontraŭstarigo de la valoro kaj la idea enhavo, tiu de la talento kaj la idea aparteno, tiu de la formemo kaj la mondkoncepto, de iu ajn venu tiu ĉi kontraustarigo. Ni estas konvinkitaj, ke tiuj ne estas konceptoj kontraŭaj, sed strikte kunligitaj, harmoniaj unu kun la alia.

De unu flanko oni kun maltrankvilo demandas: en la nuna situacio, kiam la cirkonstancoj de la ekonomia laboro iĝis pli malfacilaj, la plirigoriĝon de la materiaj kondiĉoj ĉu ne sekvos plirigoriĝo de la atmosfero spirita. De alia flanko oni sugestas, ĉu ne alvenis la tempo, ke ni devas en la burĝa senco plurigi la ideologian-politikan-kulturan vivon. De tria flanko la demando estas konceptita tiele, ĉu la kulturo ne devas foje transpreni la solvon de la okaze pliakriĝintaj konfliktoj sociaj.

Do, la analizo de la internaciaj kaj de la landaj cirkonstancoj egale motivas, ke al tiuj demandoj ni respondu nee. Ni ne devas timi pri la ordo. pri la disciplino pro plifortiĝo de la demokratismo, pro la libero komunistprincipa. Male: en niaj pensado kaj praktiko socia ni devas ilin konsideri konceptoj kunligitaj, apartenantaj unu al la alia. Oni ne forgesu: sen ordo ne ekzistas libero, sen libero ne ekzistas ordo — jen la fundamenta principo de la demokrateco socialisma.

Nia historia vojo pruvis: ĉiam pravis, kiuj pensis tiel kaj agis lau tio, ke la Homon ĝenas nur unu afero, la manko de sincero, la sento, ke li estas objekto de taktikado. Sincera, prava vorto — jen kio helpas la komunan pensadon kaj la komunan agadon. La popolo ĉiam aliĝis al la justa afero, al tiu de la socialismo, kaj ĝi ankaŭ aliĝas se ni diras malkase: la vojo malfaciliĝas, venu kaj helpu — ni vivas en pli komplika epoko, ni pensu kaj agu kune. Tio estas vera ankaŭ pri sciencisto, verkisto, artisto.

Ni ĉiuj havas respondecon pri la sorto de la justa historio de la homaro, pri ĝia pli malrapida aŭ pli rapida evoluo. La epoko provokis nin, ni ne rajtas lasi tiun provokon senresponda, sen la respondo de la leviĝanta krea atmosfero, sen tiu de la bona laboro.

El la hungara: P. A. R.

de Dagmar Hilarová

Ĉe Helena ĉiam estis io, kion la ceteraj ne havis. Jam en la lernejo, io tiris nin al ŝi, ni volis sidi apud ŝi en la benko, rigardi ŝin, esti proksime al ŝi. Ŝi disradiis ĉirkaŭ si strangajn ondojn, sen scii pri tio. Aparta ĉarmo fluis tra ŝia tuta estaĵo, ni klopodis en ĉio ŝin imiti kaj io el ŝia optimismo transiris ankaŭ sur nin. Ŝi estis en la stato de ĉiama agitiĝo, ade ĉarmita de io, surprizita, konsternita.

Ŝi kapablis vidi aferojn, kiujn alia homo apenaŭ atentis, kaj ĉiun sian novaĵon ŝi devis dividi kun iu. Ĉiuflankeco de interesoj kaj la maniero, laŭ kiu ŝi tiradis nin en sian ludon, faris nin nedisigeblaj kamaradinoj.

Kiam ni rekunvenis post vico da jaroj, ni trovis ĉe la kafeja tablo la saman Helena, kia ŝi estis antaŭ jaroj. Ŝi neniom ŝanĝiĝis. La haŭton ŝi ĉiam havis glatan kaj freŝan, la hararon — kiel tiam — en alfrunta kombaranĝo, kaj subtilan mentonon kun kaveto. Ŝi aspektis kontenta — kaj tamen tiu ĉi vivo traveturis relojn tie, kie oni devis komuti la trakforkon de sorta antaŭdestino.

La plejparto el ni estis feliĉe edziniĝinta, havis kelkajn infanojn kaj ankaŭ en la profesio ni atingis kontentigajn rezultojn.

Helena, kvankam ŝi ŝatis sian profesion — ŝi funkciis kiel infankuracistino ĉe la pediatria kliniko en la urbo Brno — en sia privata vivo ne sukcesis. Dufoje ŝi eksedziniĝis, la infano naskiĝinta el ŝia unua edzineco mortis post la nasko.

Ĉi tion ŝi elverŝiŝ al ni tuj ĉe la komenco.

Poste ŝi silentiĝis, bruligis cigaredon kaj glutis kafoguton. Griza fumnubeto ŝvebis supren al la plafono kvazaŭ animeto. Mallerte ni kondolencis al ŝi. La soleco estas malbona afero.

„Kia soleco, knabinoj? Mi estas tute ne soleca. Mi havas da ili, da etulĉjoj, tridek ses..."

Fakte, ĉe Helena ĉiam estis io, kion ni ceteraj ne havis. Io, kio ne ŝanĝiĝas tra la jaroj kaj kion la sorto ne tuŝas.

Ŝi rigardis nin per siaj saĝaj okuloj, kiuj jam denove ridetis kaj ŝia ĉarmo rekomencis ĉirkaŭvolvi nin.

„Kaj kiel vi sciis ekvilibriĝi kun ĉio?", demandis Lidunjo, kiu, post sia trifoja patriniĝo, imprese rondformiĝis.

„Tio estas longa historio, kaj se mi ĝin rakontos al vi, vi ne kredos min..."

Memkomprene, ke ni ĉiuj volis aŭdi ŝian recepton pri kontento kaj Helena ne lasis nin dufoje sin instigi.

„Mi estis tiam ĉe la rando de kolapso", ŝi komencis sian historion. Ĉio al mi fiaske renversiĝis. Mi decidis ripozigi min kaj iom vojaĝi. Ĝi tiris min, sen mia scio kial, en Hungarlandon, mi do pakis la kofrojn kaj ekveturis.

La unuan tagon estis en Budapeŝto ega varmo, mi do forpuŝis la planon rondrigardi tra la urbo kaj preferis baniĝon. Oni posedas tie belegajn termbanejojn, kie mi pasigis tutan posttagmezon. Vespere, mi ekspedis min al Fiŝista Bastiono, de kie vidiĝas ĉarma panoramo de la prilumita urbo.

De malproksime la Fiŝista Bastiono aspektis kiel fabela kasteleto, per sia blankeco miniatura analogaĵo de la Pariza Sacré-Coeur. En la aero flirtis spicitaj odoroj agitantaj la sensojn, ĉirkaŭe geamantoj promenis man-en-mane kaj en vilaj densaĵoj birdorkestro estis agordanta por ekludi sian unuan nokturnon. Mi estis soleca en fremda urbo kaj ĝuste tiu anonimeco min ravis. Mi descendis en la mallarĝajn stratetojn kaj sencele tretis la malebenan pavimon; nur kiam la kruroj ekdoloris, mi konsciis, ke mi ne scias, kie mi troviĝas kaj kiel mi atingu mian hotelon. Mi estis pasanta preter malgranda kafejeto, kiuj estas multaj en Budapeŝto, la lango gluiĝis kontraŭ la palato kaj la imago pri agrabla sidripozo ĉe bona likvaĵo superregis min.

Mi enpaŝis senhoman ejon malakre lumigitan, kie staris iom da lignaj tabloj kun stile skulptitaj benkoj kaj sur bretoj malgrandaj dikventraj vinboteloj kun kolore traplektitaj ansoj. Tuj post la pordo sidis ĉe piano juna cigano kaj mallaŭte ludis. Li ne havis aŭskultantojn kaj se la ejo pleniĝus, li konstatus tion sole laŭ la bruo. Li estis blinda. La grasaj, nigraj haroj pendis ĝis la ŝultroj, la mallarĝa, pala vizaĝo mienis preskaŭ askete. Li surhavis nigran veston eksmode fasonitan, mallarĝan pantalonon kun uzofranĝitaj refaldoj kaj disformitajn ŝuojn. Liajn okulojn kovris nigraj vitroj kaj kontraŭ la vando estis apogita lia blanka bastono.

Ĝuste kiam mi eksidis, aperis kelnero kaj superŝutis min per vortotorento. Mi mendis glaseton da vino de Badacsony, kiun li alportis fulmorapide, agrable fridigitan.

Mi bruligis cigaredon, trinketis la delikatgustan vinon kaj sentis min bone.

La ostecaj fingroj de la pianisto leĝere glitis sur la flaviĝintaj klavoj, vere agrabla medio. En mia spirito senvole reproduktiĝis la tonoj de la Brahms-valso A-maĵora, esprimanta la bonetoson, kiun mi estis sentanta. Ofte reproduktiĝas al mi certa melodio lige al la pasanta momento, ĝi ne okazis la unuan fojon. Kredeble pro tio, ke mi amas la muzikon.

Kaj jen ĝi okazis.

La cigano peze, disharmonie glitigis la artikojn sur la klavaro kaj dum ono da sekundo liaj manoj pendis en la aero. Kiam ili religiĝis kun la instrumento, ĝi estis precize en la punkto de la melodio, kie mi enpense troviĝis ĝuste en tiu momento.

Mi eksentis en la kapo varmegan formikadon. Pro dio, kiel li povis intui, kion mi estas pensanta? Aŭ ĉu tio estas hazarda koincido?... Kiam la cigano finludis, li sekigis siajn manojn per ne tre pura poŝtuko kaj trinkis iom da vino el glaseto, kiun li palpe trovis sur la piano kaj albuŝigis.

Etan paŭzon mi dediĉis al streĉpena cerbumo, kian komponaĵon elpensi kaj sendi al li per nia „spirita poŝto", por konvinkiĝi, ĉu temas vere pri nura hazardo.

En mian menson falis la Malĝoja Dimanĉo. Malnova, sentimentala kanto, kie violono lamentas, horo post horo fluas pigre, kaj iu iun atendas.

Ankaŭ tiun li ludis por mi.

Ĝis hodiaŭ mi demandas, kiu trudis al li tiun melodion. Kiu el ni la impulsojn sendis kaj kiu akceptis?

Mi provis tion je la tria fojo kaj per interna voĉo mi ekis murmureti por mi la Poem*. Ie ene en mi kantis najtingaloj kaj ekdormanta bosko tiel proksimis, ke mi sentis la dolĉan aromon de velkintaj rozoj, kiujn li kaptis en tonojn kaj kunligis en noktomezan florbukedon. Neniam antaŭe mi aŭdis reprodukti la verkon de Fibich kun tia sento. Mi aŭskultis kun fermetitaj okuloj, kun koro plenaperta kaj ĉesis percepti la spacon kaj la tempon.

La kanto finsonis, sed li ankoraŭ tuŝadis manplate la klavojn. Poste, li malrapide duonturnis la kapon al mi kaj ridetis. Li elserĉis min kaj mi sentis, ke li min ne nur vidas, sed ankaŭ konas. Pli bone kaj..."

„Kaj vi nenion parolis kun li?", saltis en ŝian parolon la ekscitita Kamila.

„Jes ... Propradire, ne. Kiam mi estis foriranta, mi devis preterpasi. Li sciis pri tio, li turniĝis kaj sur lia vizaĝo estis io, kion mi ne scias priskribi. Ia radio de lumo kaj espero, kiu min traondis kaj poste li diris al mi la unusolan vorton: B a ĥ t. Vorton, kiun mi poste multfoje ripetis al mi..."

„Kaj kio ĝi estaŝ?", ni elspiris preskaŭ samtempe.

„Longe mi ne sciis tion, serĉis reciprokan dependecon, ĉar de tiu momento mia vivo komencis ŝanĝiĝi en la pli bona senco. Mi fine ricevis loĝejon, akiris bonajn amikojn kaj en la kliniko oni komisiis al mi gvidi tutan fakon. Revenis al mi la malnova anima ekvilibro kaj, subite, mi denove havis por kio vivi. Mi korligiĝis al tiuj etulĉjoj komisiitaj al mi, kvazaŭ ili estus miaj propraj, kaj kiam ili, resanigitaj, foriras de mi, mi ĉiun bleke priploras. Ĉiuj tiuj vanaj jaroj trafalis ien, kaj mi resentis vivoĝojon."

„Kaj tiu vorto?"

„Ĝi propre devenas el la persa lingvo kaj en cigana dialekto ĝi signifas: feliĉon..."

*Muzikpoemo de la ĉeĥa komponisto Zdenek Fibich (zdenjek fibiĥ), 1850—1900. Eldonita ankaŭ kun Esp. teksto.

El la ĉeĥa trad.: Jaroslav *Marík*

„TUTMONDA SONORO"

Mondliteraturaj antologioj jam havas certan tradicion en la Esperanta literaturo. Grabowski eldonis en 1913 sian *El Parnaso de Popoloj*, poemantologion tradukitan el 30 lingvoj. Ĝi estis senkompara majstroverko de la antaŭmilita traduka literaturo.

Al lia memoro Kalocsay dediĉis en 1931 sian 350-paĝan libron, kiu portas la titolon *Eterna Bukedo*. Ĝi estis tradukita el dudek du lingvoj, kaj signifas grandan paŝon antaŭen: Kalocsay peras al la legantoj ĉefverkojn en Esperanto literature jam matura.

La sukceso de *Eterna Bukedo* efikis al Kalocsay ne ripozige, sed stimule: ĝis sia morto li laboris super nova

---

Sofokles

Antigona

(Fragmento)

Estas multo mirinda, sed
nenio ja ol la hom' pli mirindas,
ĉar li tra la maro
grizbukla navigas
en ŝtormo de sudo
sur ondoj abismaj,
kaj Gean* mem ne cedantan al altaj dioj,
ŝin la neelĉerpeblan, eternan,
jar-al-jare per sia soko** ŝanceliĝanta,
ĉevale tirata, molestas.

El gento facila de birdoj
predon por si akiras,
sovaĝan bestopopolon,
el maro salakva la rasojn
per sterno de retoj kaptas
la homo sagaca. Ruze la bestojn
de valo kaj altoj al si subigis,
al la ĉevalo de kolo harara,
al la taŭro tenaca de montoj
la jugon nuke li metis.

Kaj la parolon kaj la penson
kun vento rivalan kaj la leĝaron
li lernas, urbregulantan.
Sur rok' neloĝebla veteron
de frosto, de pluv' suferiga
li lertas eviti, kaj senhelpa ne restas
pri ajno futura, nur de la morto
li fuĝi ne povas, sed por
malsano fatala li kreas
kuracorimedon . . .

*Diino de la Tero
**La klingo de plugilo

Simonides

Epitafo

Fremda vojirant' anoncu al Lakedemona popolo:
jen ni kuŝas, obeintaj al la parolo de l' patruj'.

Palladas

Epigramo

Ĉiu ajn virin' amaras, sole du horojn dolĉajn donas:
en la nokto de la nupto, en la tago de sia mort'.

(El la helena)

Catullus

Ni vivu kaj nin amu...

Ni vivu kaj nin amu reciproke,
Lesbia, kaj la klaĉon, grumblan bolon
de oldaj severuloj spitu moke;
ĉio ĉi ne valoras eĉ obolon.
La sun' falinta estos reascenda,
sed post esting' de nia kurta lumo
eterna dormo estos ja dormenda!
Mil kisojn do ni ŝanĝu en brakumo
plus cent, kaj mil, ree ĝis la centa,
denove mil kaj cent, ĝis pri la sumo
post multaj miloj ni jam en kalkuloj
mem konfuziĝos, ĝin ne povos scii,
nek scii povu iuj maliculoj
la nombron de la kisoj kaj envii!

(El la latina)

Tomonori

*

La ĉerizarbo
floradis. Sin balancis
june kaj nigre
la haroj dum mi dancis.

La ĉerizarbo
floradis. Flor' ĉeriza
junfreŝe brilis,
la haro iĝis griza.

La ĉerizarbo
nun ree june floras.
Ĉiele june
ridetas flor'. La haroj
blankas. Min pensoj boras.

(El la japana)

mondliteratura poezia antologio, al kiu li donis la titolon *Tutmonda Sonoro*. Sed tiu libro ne povis aperi dum sia vivo.

Hungara Esperanto-Asocio decidis omaĝi al lia 90-a naskiĝtago (1981—10—06) per eldono de tiu kvante kaj kvalite grandega verko. Jen kelkaj indikoj: ĝi enhavos *ĉ. 400 poemojn (ĉ. 18 000 versojn!) de ĉ. 170 poetoj, de Faraono Ahn-Aton ĝis Majakovskij. La tradukoj estis faritaj el 30 lingvoj.*

La antaŭvideble 700-paĝa libro eliros dum la venonta aŭtuno. Ĉi-sube ni publikigas kelkajn specimenojn el la senekzempla traduka ĉefverko:

Francois Villon

Epitafo

en formo de balado, kiun verkis
Villon pri si kaj siaj kunuloj
atendante kun ili pendigon sian

Homfratoj, kiuj vivos plu sur tero,
ne havu krudajn korojn kontraŭ ni,
ja, se vi nin kompatos pro l' mizero,
vi trovos mem indulgon antaŭ Di'.
Jen kvin, aŭ ses, ni pendas tie ĉi,
kiun tro nutris ni, la karn' malpia,
jam konsumiĝas en putrado fia,
kaj ni, la ostoj, iĝos cindro, polvo.
Ne moku nin kun rido ironia,
sed petu por ni Dion pri absolvo.

Ho fratoj, ne malŝatu kun fiero
ĉi krion, kvankam juste estas ni
ekzekutitaj. Scias vi pri l' vero,
ke ne distingas ĉiun saĝa pi'.
Ho preĝu do kun kora emoci'
al sankta Fil' de virgulin' Maria:
ne velku por ni lia graco dia,
ne brulu ni sub la infera volbo.
Ni mortis jam, do for insulto ĉia,
sed petu por ni Dion pri absolvo.

Nin lavas kaj lesivas pluv-vetero,
nigrigas kaj ŝrumpigas sun-radi',
kaj manĝas bird' el nia okul-bero,
el brov' kaj barb' elŝiras pli kaj pli,
sen halt' momenta svingas la furi'
de l' vento nin, laŭ sia plaĉ' varia,
jen al ĉi flank', jen al la flank' alia,
fingringe nin bek-truis pigo, korvo,
vin gardu do de kunfrateco nia,
sed petu por ni Dion por absolvo.

Dedico

Princo Jesuo, mondregant' radia,
nin ŝirmu, savu de l' Satan' rabia,
ne ligu plu nin al li ŝuld' sen solvo,
kaj homoj, ĉesu rido, moko kria,
sed petu por ni Dion pri absolvo.

(El la franca)

Adam Mickiewicz

Ventego

Ŝiriĝis vel', rompiĝis direktil'. Tempesto!
Ekveas timo. Ĝemas pumpilo misaŭgura,
ŝiriĝis el la manoj la lasta stumpo ŝnura,
sangruĝa sun' subiras, kun ĝi: espera resto.

Venteg' triumfe hurlas, kaj sur la ondo kresto,
etaĝe leviĝanta el marĥaos' terura,
ekiris al la ŝipo la mort', kiel al mura
ruino la soldato kun sturm-ataka gesto.

Jen, iuj svenas, iuj mantorde ĝemas vorton,
aŭ adiaŭbrakume sin tenas mortangore
aŭ preĝas antaŭ morto, por peli for la morton.

Flanksidas pasaĝero, kaj pensas li dolore:
feliĉa, kiu preĝas, kaj kiu perdas forton,
kaj kiu havas iun por adiaŭi plore.

(El la pola)

William Shakespeare

Soneto LXXV

Vi estas al mi, kiel nutr' al korpo,
aŭ dolĉaspica pluvo al terbulo,
kaj tia lukt' min tenas en absorbo
por vi, kiel pri l' riĉ' la avarulo
fierplezuras, sed de tim' suferas,
ke l' ŝtela tempo rabos lian riĉon.
Jen esti kun vi sola mi preferas,
jen, ke la mondo vidu ĉi feliĉon.
Jen vidfestenas mi, se vin mi vidas,
jen por rigard' mi mortas de malsato,
plezuron mi nek havas, nek avidas,
krom kion donis, donos vi, amato.
Jen en mizer', jen en festen-ebrio,
manĝegas ĉion mi, aŭ mankas ĉio.

(El la angla)

Oldrich Kníchal

MILITFINO

Ili staris triope antaŭ aperta pordo. Ni estas komanditaj tien ĉi, diris la plej alstatura. Tien ĉi — li svingis la manon soldatsalute kaj atentopozis ĝis kiam la virino kapjesos. Nur pro ĝentileco li atendis, la ordono estis klara: enloĝiĝi en tiu ludomo kaj atendi la sekvajn instrukciojn. Ĉiuj tri atendis nur bonvenigan geston de la mastrino.

La virina jupo ondiĝis kaj de malantaŭe ekblovis kontraŭ grizkoloraj figuroj febla sed protestoplena voko:

— Tiel ne decas blasfemi mian panjon!

Tio estis neatendita. Longa serĝento embarase silentiĝis. Li fleksis unu kruron, poste la alian, liaj buŝanguloj komencis konvulsie leviĝi, ĝis fine li kaŭriĝis, ekkaptis, enbrakigis tiun kuraĝuleton kaj ekbalanciĝis kun li kaj la sufokita rido liberiĝis.

La nova milita ruzo de la komandanto ekplaĉis al la kunstarantoj. Ride, senbride ili ambaŭ subtenis la ĉefon kaj la brugaja kaskado neĝenite kuris tra la koridoro. *Molodec, molodec,* bravulo, fingrumis la komandanto al la bubeto, kiu rerifuĝis malantaŭ la jupon.

— Jen — kaj li frapetis la frunton, jam kun serioza mieno, rigardu mastrino, kion ni bezonas. Li kunmetis la manojn frotante unu per la alia. Kompreneble?

— Aha, lavi oni povas, diris la virino, timigite.

— Jes, lavi. Ankaŭ baniĝi ni ŝatus. Ŝi ekhejtis sub kaldrono, sed antaŭe sekrete ŝmiris per karbopeco la rozkolorajn vangojn por kaŝi ilin. Kiu scias? Tiuj sovaĝuloj la dion ne respektas, diablo prenu ilin!

La serĝenton interesas latunaj pordoklinkoj fulmobrile poluritaj, kvazaŭ el oro. Ĉiu novaĵo entuziasmigas lin. La fingron li ŝovas en konektilon, sed elektra ŝoko iomete moderigas lian scivolemon, kiel atakanton. kiu retroiras antaŭ malamika tranĉeo.

Liaj kamaradoj antaŭ la domo elektis ludon pli sekuran. Feliĉaj pro momenta senokupo, for de militaferoj, nekalkuleblaj noktaj gardostaroj, for de ĉia danĝero, ili nun freneze biciklas — dorse al stirilo. Betona pavimo estas gaja parko, ili estas grandaj infanoj kaj la malnovaj bicikloj: bagatela ĝojo retrovita post suferigaj bataliroj. Ili intence biciklas tiel, kun turnita dorso, kunpuŝiĝas, misturniĝas, falas, leviĝas kaj denove klaŭne kaj ridindemove veturas preter la okuloj de la tuta domo, kaj tio estas verŝajne ilia unua plezuro pagita per longaj streĉaj monatoj. Ili estas kontentaj, kaj varma vespermanĝo lulas ilian stomakon kiel bubon patrina kanto.

La serĝento plu kaj plu rigardas kaj apenaŭ povas kredi al siaj propraj okuloj. Sur la betona ŝoseo oni portas iun sur brankardo.

Diable, sed li aspektas kiel kadavro kaj la portantoj paŝas iel hezite, hezitege. Nenia brankardo, kompreneble, sed kial paki lin en kovrilon, tio ne estas funebra marŝo!?

La serĝento leviĝas, palpas la pistolon, kio regajnigas al li spiritan ekvilibron, ĝustigas zonrimenon kaj subŝovas bluzrandon. Mekanika, neevitebla sekvo de longjara dresado. soldata figuro ĉiam laŭpreskribe fasonita.

Ŝarĝo, kiu montras nenian vivsignon, jam estas enportata, rulmetita sur kahelan pavimon. Jam oni vokis flegistinon de transa loĝejo, jam ŝi venis kaj eklamentis plorsingulte. Se mia filo, se mia filo tiel... Tiu ĉi estas kiel li, sed tute nigra, tute nigravizaĝa.

Knabeto posteniĝas ĉe la virina jupo kaj de tie observas la nigrajn botojn, kiuj elstaras de sub la dika kovrilo. La serĝento pieddise kliniĝas super tiu sakforma io, super la flegistino, kies manoj frotas rigidan junulan vizaĝon, ŝmiras lian frunton per mentolodora likvaĵo kun akrepenetra odoro, refreŝiga en febro kaj agrabla kiel ventolo.

— Kian malsanon li havas? — tiras jupon la bubo.

— Dio absolvu lin, li estas tutebria — flustras la voĉo desupre.

— Li vivas — konstatas seke la serĝento kaj mangestas al tiuj du. La senmovulo falas sur trivitan kanapliton en antaŭĉambro.

— Mastrino — frapas la serĝento la virinan ŝultron — mastrino, ni lasu lin tie ĉi senzorge. Mansvinge li bagateligas la aferon. Nenio. Ĉio en ordo.

Matene ŝutroj apertiĝis kaj la suno heroldis belan printempan tagon. Sur forna plato bolas akvo, la soldatoj jam estis preparantaj grasan manĝon. En la antaŭĉambro apogitaj kontraŭ la muro orde staras aŭtomatpafiloj, desur ĝi pendas zonrimeno kun kartoĉoj kaj unu plia ĉapo de hieraŭ, malpura kaj ĉifonita kiel ĝia posedanto kiam oni portis lin el drinkejo.

Kaj en la kuirejo klaketadas nigraj botoj kvazaŭ remarŝigitaj per sorĉa vergo. La junulo brupaŝas tie kaj rikanas, kvankam la mastrinaj rigardoj sabrotranĉe spitas lian bonhumoron:

— Ĉu vi dion ne timas, se la morto jam akcipitris vian nigran animon? — ŝi duonvoĉe kolerete skoldas, rememorigas la penton kaj humilan koron.

La nigra animo ĵus klopodis suprenĵeti la bubon al plafono kaj ŝiaj admonoj resaltis de lia aŭdo kiel pizoj ĵetataj kontraŭ la muron.

— Jes, la dio estas senfine bonkora, li domaĝas pekantojn — severe ŝi pluadmonas. — Kaj ci ankaŭ povas danki Lin, kiu cin povis trafi per sia justo. Kiel bona paŝtisto, li forlasas naŭdek naŭ ŝafojn por retrovi unusolan, centan, kiu perdiĝis.

— Mastrino, ĉe ni multege da ŝafoj, nenia paŝtisto — impertinente rikanas tiu diabla filo.

— Ho, jes, ridu nur, dio ne mezuras per tagoj kaj neniu povas antaŭsenti sian propran faton. Kiu povas ajnon antaŭvidi?

— Mastrinjo, mi trifoje preskaŭ mortis. — Kaj li kuspas ĉemizon montrante cikatrojn sur la brusto, sur la dorso, sur la manoj. — Nun tute en ordo.

— Krom viaj malpuraj botoj — ŝi malrespekte rediras kaj inspektas abomene lian surhavaĵon. Ili venis tiel neatendite, malorde, apenaŭ ŝi povis tapiŝon forruli de la ĉambro. Ili sidiĝis sur litrandon, pafiloj interkrure enpremitaj, balancis kapojn kaj kantis senfine obtuze, kantis noktodaŭre. Tiuj gastoj.

Kaj nun ŝi preskaŭ malfruvenos al matena meso, sonorilegoj jam batas la okan, kiel malagrable.

La tri soldatoj — ĉar nur tiomaj restis en la domo post tiu nokto sen sirenoj — kun profane indulgaj mienoj alrigardas efluvon de la mastrina indigno.

— Nenio daŭras eterne — ŝi pintigas sian averton per levita fingro.

La serĝento kun konfirma rideto observas ferfaritan svastikon, kiu dioscias de kie aperis surplanke, eble hieraŭ post ordigado de fatraso.

Kiel realiĝis la Enciklopedio de Esperanto?



Ludoviko Kökény

Nia Esperanto paŝadis nur en junulaj ŝuoj (kelkfoje eĉ mispaŝis), kiam en 1913 la ruso Petro *Stojan* (nask. 1884) proponis la eldonon de „Universala Slipa Enciklopedio", kiun li volis aperigi sur apartaj slipoj por ĉiu temo. Stojan kiel eminenta scienculo de la vortara tekniko, verkis la grandan rusan vortaron de Imperia Akademio, kaj Ilustritan Vortaron de la rusa lingvo sur 760 paĝoj kaj kun 2000 bildoj. Stojan estis la aŭtoro ankaŭ de la „Bibliografio de Internacia Lingvo" (1929, 560 p.).

En 1917 Vladimir *Smurlo* rusa inĝeniero (nask. 1865) verkis ANA — Alfabetan Nomaron — Adresaron, kiu estas rigardebla la unua provo de E-Enciklopedio.

Ankaŭ la tria iniciatinto estis ruso: Ivan Genadieviĉ *Ŝirjaev*, unue instruisto, poste vilaĝa ortodoksa pastro (nask. en 1877, mortis en 1933).

Kaj alvenis la jaro 1931, sortodecida ankaŭ por mia propra agado. Jen kiel tio okazis:

Tiutempe jam laboris tutforte kaj kompetente Vilhelmo (Vilmos) *Bleier*, unu el la plej konsciaj kaj meritplenaj agantoj de la tuta Esperanto-movado (1903—1940). Dum la jaroj 1924—1930 li estis pagita oficisto de Hungaria Esperantista Societo Laborista. Kaj en ties kadro Bleier organizis ankaŭ bone funkciantan eldonan fakon. En 1930 li fariĝis administranto, teknika aranĝanto kaj ĉefa posedanto de Literaturo Mondo. Kiel „Gvidlibro por supera ekzameno" (1979) konstatis: „L. M. ... en apenaŭ ok jaroj sukcesis aperigi 80 volumojn kaj inter ili kelkajn el la plej signifaj verkoj de nia literaturo. Per la kreo de la eldonkooperativo AELA Bleier trovis la vojon al la publiko, lerte spitis financajn malhelpojn kaj valutajn barojn ĝis la pleja limo de ebloj. — Estas malfacile taksi la servon, kiun L. M. faris al la e-ismo, sed oni povas aserti, ke dum du jardekoj ĝi estis la pulmo per kiu spiris la plej viva parto de niaj literaturistoj."

Ni mem ofte gastadis en la loĝejo de Vilmos Bleier (Mester strato 53.) do ni havis la eblon interamikiĝi. Kiam en 1931 mi vizitis Bleier, li tuj kaptis sian gravan diraĵon:

— Kara Amiko *Kökény!* Mi volas priparoli kun Vi gravegan aferon! Mi scias, ke Vi jam kunlaboris por kvar hungaraj leksikonoj, Vi aperigis diversajn artikolojn pri historio de nia Esperanto. Unu el Viaj fakoj estas mezlerneja instruisto de historio. Kvankam Vi estas unu el la gvidantoj de Hungara Esperanto-Societo, „neŭtrala", fakte burĝa societo, tamen Vi alte taksas la agadon ankaŭ de HESL, nia laborista societo. Krome iu sufloris al mi, ke pro Via socialista sinteno Vi estis eksigita por unu jaro el la Universitato. Do Vi estas mia homo! Pro tio mi proponas al Vi, estu redaktoro de la eldonota Enciklopedio de Esperanto.

En tiu momento mi eĉ vorton ne kapablis respondi, sed Bleier nun metis sur la tablon unu grandan kaj sep malgrandajn manskribitajn kajerojn, kaj diris:

— Jen tio estas la laborajo de la rusa esperantisto Ivan *Ŝirjaev*. Li dediĉis kelkajn, se ne multajn jarojn, por kolekti tiun ĉi materialon. Malgraŭ tio, ke li estas pastro, en tiu ĉi laboraĵo li ne parolas pri sanktuloj kaj profetoj, sed tiuj ĉi kajeroj pruvas, ke li kapablas prezenti historiaĵojn laŭ objektiva maniero.

La redaktoro de la lingvaj artikoloj fariĝis prof. d-ro Kolomano *Kalocsay* (1891—1976), plej eminenta literaturisto de Esperanto. Pri la du redaktoroj, Ludoviko *Kökény* kaj Vilmos *Bleier* ni jam havas laŭ la antaŭe diritaĵoj konvenan taksadon. Sed ni havas la devon de kompletigo konekse kun Bleier.

La kuraĝa eldonisto de multaj valoraj libroj de Esperanto, estis vivanta nur kvin jarojn post la apero de la Enciklopedio, „Li kuŝis kiel malsanulo pro meningito en hospitalo de Parizo, kiun okupis la germana nazia armeo. Granda parto de la loĝantoj, ankaŭ la „fuĝipovaj" malsanuloj forfuĝis, kaj la sorto de Bleier sen kuracista prizorgo estis sigelita. Li do mortis en 1940 kaj kuŝas en la tombejo „Cimetiere Parisien de Thiasis 82. division, 20. ligne, No 27." (Kalocsay: Vilmos Bleier, Hungara Vivo 1968(4, 1—3. p.).

De la tragedio de tiu ĉi grandega viviganto de nia literaturo nun ni reiru al la enciklopedia laborado. Krom la redaktoroj agadis 57 ĉefkunlaborantoj kaj kunlaborantoj. 50 personoj „verkis artikolon aŭ donis valorajn konsilojn". Du kontrolantoj zorge tralegis la kompostitan materialon kaj helpis ekstermi la lingvajn kaj aliajn erarojn.

Ili estis: Montagu Christie *Butler* (nask. 1884 en London) kaj Talivaldo *Indra*, latvo (nask. 1894 apud Riga) La plej gravaj ĉefkunlaborantoj estis: Louis *Bastien*, franca generalo, nask. 1869, Gerrit Paulus *Bruin*, nederlando, fabriklaboristo, poste kontoristo (nask. 1895), ĉefa pioniro de la laborista E-movado. Paŭl *Tarnow*, inĝeniero, kunfondinto de UEA (nask. 1881), Edward *Wiesenfeld*, polo, dentkuracisto (nask. 1892), diversmaniere laboranta e-isto.

Komenciĝis la lavango de leteroj kaj poŝtkartoj al la kunlaborantoj en multaj landoj. Ili devis sendi informojn pri esperantistoj, pri la historio kaj la nuna stato de Esperanto en multaj landoj kaj fakoj. Estis serĉitaj ilustraĵoj pri gravaj movadanoj kaj literatoroj. Ĝis nun neniam estis tia svarmado inter la samideanoj, la kongresa similaĵo ja estas alispeca.

Kaj ege pravas la „Antaŭparolo de la Redaktoroj", laŭ kiu: „Pri la grandega laboro de redakto orientu, ke la redaktoroj skribis dum tri jaroj plurajn milojn da leteroj (el kiuj cetere ne malgranda parto ne ricevis respondon), tiel ke por la afrankado de leteroj kaj cirkuleroj la eldonejo elspezis sume kaj ronde 800 frankojn svisajn."

La 1-a volumo de la Enciklopedio aperis la 21-an de junio 1934, la dua volumo meze de 1935. La formato estas 23,5x15,5 cm, la unua volumo havas 271 tekstokaj 110 bildopaĝojn, la dua volumo 327 teksto- kaj 184 bildopaĝojn. La du volumoj do havas 600 tekstopaĝojn kaj 284 bildopaĝojn. Sur ĉie paĝo troviĝas duoble 57 linioj, en ĉiu linio estas 35 literoj, do unu paĝo enhavas rondcifere 4000 presliterojn. Tio signifas, ke la kompostado rezultis sufiĉe densan aspekton. En la listo de „Gravaj preseraroj kaj aliaj eraroj" viciĝas 26 eraroj kaj mankoj, relative malmultaj.

Nun kelkaj laŭnombraj interesaĵoj pri la artikoloj mem. En la verkego troviĝas biografioj pri pli ol 1500 esperantistoj, 5—10 liniaj rubriketoj pri ĉ. 450 libroj,

Hungara verkisto — vera Europano

Lajos Bíró en vico de niaj „centjaruloj"

Havanta pli ol duonmiljaran pasinton kaj tradiciojn, la hungara literaturo komence de la 20-a jarcento atingis kaj transpasis sojlon de nova epoko: ekburĝonis kaj ekfloris literaturo altnivela, moderna, speciale hungara, kaj tamen ne izolita disde tendencoj de la mondliteraturo.

Al tiu ekfloro krom feliĉa renkontiĝo de sociaj bezono kaj kondiĉoj estis bezonata ankaŭ aro da junaj, talentaj literatoroj. La nomoj: Ady, Krúdy kaj Móricz estas jam konataj por nia legantaro. Pri ili, naskiĝintaj en la sama vico en 1877, 1878, kaj 1879 ni aperigis apartajn numerojn. Al tiu generacio — dudekjaruloj ĉe la jarcentkomenco, kapablaj porti freŝecon, novan sangon en cirkuladon de literaturo vivo — apartenis ankaŭ Lajos Bíró, naskiĝinta antaŭ cent jaroj, la 22-an de aŭgusto en 1880.

Okaze de tiu ĉi jubileo ni primemoras la publiciston kaj verkiston, eminentan reprezentanton de burĝa radikala literaturo, ankaŭ la tutmonde konatan specialiston de filmarto: la scenariiston, kaj fine, sed ne lastvice ni primemoras lin kiel aktivulon de la Lingvo Internacia.

Naskiĝinta en la ĉefurbo de Aŭstrio en la iama Aŭstra—Hungara Monarkio, en Vieno, li edukiĝis en Hungario, finis mezlernejon en Eger. Baldaŭ li eklaboris kiel ĵurnalisto, kaj ekde 1900 — post reveno el studrestado en Parizo — li fariĝis kunlaboranto de la gazeto Szabadság (Libero) en Nagyvárad, kie aktivis en la sama tempo ankaŭ Endre Ady. Komunaj celoj, samaj ideoj entuziasmigis ilin ambaŭ — estas do nature, ke ili ankaŭ amikiĝis. Lajos Bíró estis la unua, kiu rekonis poetan grandecon de Ady, ankaŭ en artikoloj. Ilia amikeco pliprofundiĝis poste, kiam denove ili fariĝis kolegoj — jam en Budapeŝto, ĉe la gazeto „Budapesti Napló".

Tiutempe en la centro de lia publicistiko staras la lukto por la demokrata balotrajto. En 1906 aperis lia unua novelaro (Tridek noveloj). Komence lin influis la naturalismo, la noveloj en streĉa atmosfero prezentis kontraŭdirojn de la tiama burĝa moralo. Baldaŭ li fariĝis konata ankaŭ kiel dramisto: liajn dramojn (Viroj, La triumfa virino, Flava lilio, 1910) prezentis la Nacia Teatro. Pro cedemo al gusto de la teatra publiko, la socikritiko en tiuj dramoj iom malfortiĝis.

Postedziĝe en 1906 li vivas unu jaron en Berlino, poste denove en Budapeŝto, kiel kunlaboranto de gravaj opoziciaj gazetoj. Konvene al siaj idealoj li partoprenas la fondiĝon de Burĝa Radikala Partio. Dum la unua mondmilito menciindas liaj kontraŭmilitaj artikoloj.

En la politika vivo li ekvigliĝis dum la revolucioj: en la registaro de Károlyi li iĝis ŝtatsekretario pri ekster aferoj, dum la Konsilia Respubliko membro de verkista direktorio kaj prezidanto de la Verkista Sindikato. En 1918 li ekagis ankaŭ por Esperanto: krom lingvistoj József Balassa kaj Zsigmond Simonyi, la verkisto Frigyes Karinthy, ankaŭ li fariĝis membro de „Komitato de la Lingvo Internacia". Tiu komitato faris tiutempe ampleksan laboron, aperigis multajn artikolojn, propagandis por Esperanto. Ankaŭ li multe kontribuis al tio, ke dum la Konsilia Respubliko fakte komenciĝis Esperanto-instruado (26. aprilo 1919) en la Budapeŝta Scienca Universitato.

Pro partopreno en la revolucioj li devis elmigri post ties malvenko. Vieno, Romo, Parizo, Berlino kaj Londono estis liaj ĉefaj stacioj. En tiu periodo li atingis sukcesojn pere de filmscenaroj, komence verkitaj por Usonaj firmaoj, poste ekskluzive por London Film Production, kies kunlaboranto li restis ĝis la la morto, en 1948.

Esperantistaj legantoj ĝis nun malmulte povis legi el lia verkaro, entute tri novelojn: La infano (1913) eldono de Kókai, tr. Dobler, Fraŭlino Ida en traduko de Rereips (Spierer, ŝanĝita nomo: Somlai) en 1930, kaj en Hungara Antologio aperis de li La duonfilo en traduko far Halka.)

Temas pri verkisto signifa, anstataŭ paroli pri li, parolu lia verko.

M. F.

---

kelkliniaj rubriketoj ankaŭ pri ĉiuj iom gravaj Esperantaj gazetoj.

Ni fermas nian artikolon per ĝojesprimo. Jes, post 45 jaroj Enciklopedio de Esperanto (la teksto-parto) denove aperas. Ĝi atendas la interesiĝon de ĉiuj esperantistoj en ĉiuj landoj. Kelkaj legados tiun ĉi verkegon paĝon post paĝo, ripozante iomete post legado de kelkaj artikoloj. Aliaj serĉados detalojn pri iuj temoj aŭ personoj. Troviĝos ankaŭ esplorantoj de la pasintaj tempoj kaj agadoj. Certe ĉiuj ĝojos havante tiun ĉi utilan manlibron. Tiu ĉi verkego raportas pri la unuaj 45 jaroj de la historio de Esperanto, grava socia movado de nia epoko. Kaj la reaperigo de nia verkego instigos ĉiujn kompetentulojn por prilabori kaj aperigi la daŭrigon, la novan Enciklopedion.

RIĈIGU VIAN BIBLIOTEKON!

Tiu ĉi granda verko de Kökény kaj Bleier aĉeteblas ĉe ĉiuj libroservoj. Esperantistoj en nesocialismaj landoj povas aĉeti ĝin kontraŭ 45,— ned. gld. ĉe la Libroservo de UEA, en socialismaj landoj oni serĉu ĝin ĉe sia landa asocio, krom en Sovetio, kie esperantistoj povas aĉeti ĝin kontraŭ 13,75 rubloj pere de la Estona Filio de ASE. Mendoj oni sendu al: K-do Johannes Palu, 200016 TALLINN, Solme 21, Estona SR. Ne hezitu tuj mendi, ja estis presita nur limigita eldonkvanto!

Lajos Biró

LA HELO

Lona svenis.

En la loĝejo estiĝis granda kurado, el la malgranda tajlormetiejo tintego estis aŭdebla. Iu suprenkuris la unuan etaĝon, kaj anhelanta revenis:

— Venas la Profesora Moŝto!

Post du minutoj alvenis la fama kuracisto, altkreska, tatarvizaĝa, kvardek-jara viro.

— Ĉu tiu ĉi estas la blinda knabino? — li demandis pri Lona.

— Jes, Profesora Moŝto!

— Enlitigu ŝin, nenian malsanon ŝi havos.

Oni enlitigis ŝin. La kvardek-jara viro per kuntiritaj okuloj rigardis la admirindan belecon de la knabino.

— Kiom da jaroj havas tiu ĉi knabino.

— Dudek, profesora Moŝto.

— De kiam ŝi estas blinda?

— Depost ŝia oka jaro.

La profesoro ankoraŭ donis unu-du kuracistajn ordonojn, poste li preparis sin por foriri.

— Ĉu, ŝi havos nenian malsanon, mi petegas? Ĉu ni ne faru ion alian por ŝi, Profesora Moŝto?

— Edzinigu ŝin — murmuris la profesoro kaj foriris.

Post monato la profesoro edziĝis al la knabino. Lona estis tre feliĉa. Ŝia blindeco ne malhelpis ŝin por ĝui la bonhavon: ŝi ŝatis la grandajn, tapiŝitajn ĉambrojn, al kiuj ŝi alvenis el la malvasta tajlora loĝejo: ŝi ĝojis, ke ŝi posedas servistinojn, al kiuj ŝi povas doni ordonojn, kaj ŝi adoris sian edzon, kiu tiel dorlotis ŝin, kvazaŭ infanon, kaj kiu por ŝi estas la enkarniĝinta forto, grandeco, potenco kaj beleco, li estis la abunda fonto de la riĉeco kaj ĝojoj, la kavaliro de la sonĝoj de ŝia blinda knabineco.

Al ili naskiĝis knabineto, posto knabeto, kaj en la koro de Lona malfermiĝis nova mondo de la vivĝojoj, nova imperio de la feliĉo: en la koro de la blinda virino kun aminda plezuro kreskis la sento de la patrineco. Ili estis tre feliĉaj.

Lona estis dudekses-jara — forta, plaĉaspekta, juna virino — kiam ŝia edzo hejmenvenante dum iu tagmezo, ekkaptis sian manon:

— Turnu vian vizaĝon en ĉi tiun direkton, al la lumo!

La profesoro rigardis la okulojn de Lona, kaj diris al ŝi:

— Lona, mi operaciigos viajn okulojn. Mi akompanos vin al la kliniko, tie vi restos du semajnojn kaj poste vi denove vidos.

Lona adiaŭis: kisis la kvinjaran knabinon, la trijaran knabon kaj foriris. Oni operaciis ŝiajn okulojn, en malhela ĉambro ŝi vivis du semajnojn, kaj la dekkvinan tagon kun malfermitaj kaj vidantaj okuloj ŝi rigardis al la plena kaj brila lumo de la suno.

La edzo venis por ŝi. La viro estis emociita, li ekzaltiĝis:

— Mia ĉarma, karega Lona, kiom mi estas feliĉa! Mia nigrabukla, bela infano, kiel bela vi estas... kiel belaj estas viaj okuloj, vi, mia bela Lona, mia blanka virino!... Ĉu ne, Lona, estas belaj la mondo, la vivo, la sunbrilo... Lona, vi vidos niajn geknabojn... Lona, la vidado duobligas ĉiun ĝojon de la vivo.

Lona konfuzite rigardis lin kaj silentis. Ili enkaleŝiĝis, veturis hejmen tra la urbo, kiu banis sin en la somera sunlumo, al la du geknaboj. La viro ĝojkriis:

— Nun jam povas brili la somera suno, ĝi povas fajreri, blindigi: Lona enrigardas ĝin, Lona vidas!

Lona deturnis sian kapon. Rigardis la aleon, sur kiu la kaleŝo rapidegis, rigardis la tutan rosumitan someran matenon: la vivo vere estas bela. Ŝi rigardis la irantojn: la koloraj vestoj vere estas belaj: ankaŭ inter la homoj estas, kiu preskaŭ similas tiun bildon de la homa beleco, kiun ŝi kunportis el la helo de sia infaneco al la malhelo de la blindeco.

La profesoro plezure rigardis la silentantan virinon, kvankam Lona fortiris sin de li. Ĉu tiu estas ŝia edzo? Kiam ŝi estis blinda ŝi ne konjektis, ke la haŭto de la edzo estas tiel flava, lia barbo, kiu aspektis por ŝi silka — estas tiel sporada kaj trivita, liaj nazo, kapo havas groteskajn formojn. Ŝia timema penso ne kuraĝis diri ilin turpegaj, nur konfesis ian strangecon kaj fremdecon.

Ili alvenis hejmen. Kun laŭtaj krioj venis la infanoj kaj kun brua ĝojo brakumadis la patrinon.

Lona silentis. Timeme ŝi rigardis ĉirkaŭen en la konata loĝejo: vere, tiu loĝejo estas ŝia, tamen en tiu ĉi loĝejo ĉio iĝis fremda por ŝi. Kion ŝi serĉas ĉi tie inter la fremdaj viro kaj du infanoj, kies ĉiuj trajtoj surhavas la tatarvizaĝon de la patro?

La malbeleco kuratakis kaj narkotis ŝin. Ĉu iam ŝia mola mano karesis ĉi tiujn kapojn, sed tiam ili estis admirinde belaj, buklaj, anĝelaj kapoj. Iam ŝi alpremetis sin al tiu ĉi fleksiĝinta viro, sed tiam li estis plaĉforma junkavaliro. Tiu ĉi malbeleco insidatakis kaj distretis ŝin. La malbelegeco de ĉi tiuj homoj doloras, bruligas kaj bruletigas.

La infanoj ankoraŭ kisis la patrinon, eĉ apenaŭ pasis la unua minuto de la revido, Lona amare komencis ploregi.

La edzo karesadis ŝian densan, nigran hararon:

— Tiu estas la ploro de ĝojo.

La amara plorego tamen ne volas ĉesi, ĝi ŝajnis eĉ pli dolora kaj ribela.

— Kio malbona, Lona?

— Mia dio, mia dio!

— Lona, kio malbona?

Lona mordis la propran lipon kaj ploregis sufokiĝante.

— Do, kio malbona? — krakis la suspekto en la viro.

— Mia dio, mia dio!

— Lona? — sonis minacante la vorto de viro.

Li ekkaptis la artikon de Lona:

— Rigardu al mi! Kio malbona?

Lona konvulse, dolore, ribelanta ploregis:

— Mia dio, mia dio, ja vi estas tiel malbelaj!

...Estiĝis granda silento. Ĉirkaŭ ili la aero peziĝis, ĝin faris malvarmeta la ombro de akraj antaŭsentoj, ekvibrigis elspiraĵoj de venontaj tragedioj.

La infanoj retiriĝis ektimante, al la vizaĝo de la edzo la ĉagreno, kolero kaj turmento pelis obskurajn sangondojn. La virino rimarkis, ke ŝi agis mise, kaj moviĝis en ŝi la timo pro la bonstato. Kaj apenaŭ rifuĝinte el la blindeco, la virino faris sian unuan fraŭdon: per superhoma fortostreĉo ŝi aperigis rideton de amo sur sia larmoplena vizaĝo, kaj ridante, larmante, pardonpete, per hipokrito de la eksplodanta amo, ŝi preme ĉirkaŭbrakis la edzon.

El la hungara: János *Podani*

Ĉapitroj el la histori

17. La socialisma transformigo.

Distribuo de la agroj printempe de 1945

La lando liberiĝis el sub la faŝisma jugo, sed la rekomenco de la vivo ne estis facila. Hungario estis ruinigita, kaj signifa parto de la loĝantaro kredis maleblaĵo rekonstrui ĝin en tempo relative mallonga. Escepto estis la Hungara Komunista Partio, kiu kredante je la fortoj kaj kapabloj de la hungaraj laboruloj, alvokis la popolon kolekti siajn fortojn kaj komenci la rekonstruadon.

La unua grava atingaĵo de la hungara demokratio estis la konsekvenca kaj funda agrara reformo. Inter pli ol duonmiliono da senhavaj kamparanoj estis distribuitaj pli ol 3 milionoj da hektaroj de la grandbienuloj.

La liberiĝinta lando aktive respondis je la alvoko de la Komunista Partio, sed ankoraŭ ne estis decidite, sur kiu vojo la lando ekiros. La balotoj fine de 1945 montris, ke la batalo por la estonto ne estos facila. La tri maldekstraj partioj (KP, SDP kaj la Nacia Kamparana Partio) akiris 42 procentojn de la voĉoj, tamen la absolutan plimulton atingis la Sendependa Etbienula Partio, kies vicoj politike estis tre heterogenaj.

Kun la helpo de sovetaj soldatoj oni konstruas ponton tra Danubo



Sed dank' al la persista batalado de la maldekstraj amasoj kaj la tre aktiva partopreno de la Komunista Partio en la elane komencita rekonstruado de la lando, la dekstra reakciularo perdis pli kaj pli siajn pli fruajn poziciojn. Gravega atingaĵo de la rekonstrua laboro estis la kreo de la nova hungara mono: la *forinto*. Ĝi estis enkondukita la 1-an de aŭgusto de 1946, kaj tio metis finan punkton al unu el la plej svenige rapidaj inflaciaj procezoj de la monda historio. Post unu jaro, en aŭgusto de 1947 estis proklamita la Trijara Plano de la rekonstruado.

En la balotoj de 1947 la Komunista Partio plu fortiĝis. Amasoj da socialdemokrataj laboristoj komencis forlasi sian partion por aliĝi al la KP. En marto de 1948 la du laboristaj partioj — KP kaj SDP — unuiĝis kaj fondis la Partion de Hungaraj Laboruloj. Dum la sama jaro oni alŝtatigis ĉ. 85 procentojn de la industrio de la lando. La vojo de la evoluo estis elektita: la hungara popolo decidis iri la vojon de la socialisma konstruado. Tiun situacion respegulis la nova konstitucio, proklamita la 20-an de aŭgusto 1949, laŭ kiu la nova nomo de la lando estas *Hungara Popolrespubliko*, en kiu *ĉiu potenco apartenas al la laboranta popolo.*

Sed en la sama jaro komenciĝis ankaŭ la periodo, kiun la historio etikedas „kulto de personeco", kaj en kiu viktimiĝis aro da plej elstaraj batalantoj de la hungara laborista movado. Tiu periodo daŭris ĝis 1953, kiam, post la morto de Stalin, la Centra Gvidantaro de la Partio funde kritikis la ĝistiaman politikan praktikon, kiun karakterizis ne nur senbazaj procesoj kontraŭ elstaraj komunistoj, sed ankaŭ senpripensa ekonomia politiko, rezultiganta malaltiĝon de la vivnivelo en la lando. Mátyás *Rákosi*, gvidanto de la Partio, kiu havis grandegan respondecon por ĉio ĉi, promesis respekti la kritikojn kaj fari ŝanĝojn, sed fakte li ne plenumis la decidojn de la Centra Gvidantaro. Tiun fakton profitis grupo de reviziistoj, sin kaŝantaj en la gvidantaro de la Partio. Tiu grupo, estrata de Imre Nagy, volis ĉesigi ne nur erarojn kaj kulpojn faritajn de Rákosi, sed deziris likvidi ankaŭ atingaĵojn de la socialismo.



János Kádár malfermas la mitingon de unuiĝo de la Komunista Partio kaj Socialdemokratia Partio

le la hungara popolo

Meto de la fundamentoj de la socialismo

Sekve de la dogmatisma partia politiko kaj de la agado de la reviziisma grupo, la 23-an de oktobro 1956 komenciĝis kontraŭrevolucia ribelo en Hungario. Tiu ribelo ekis kun la devizo „purigi la socialismon", sed baldaŭ evidentiĝis, ke oni direktas ĝin el eksterlando, kaj la vera celo de la ribelo estas likvido de la socialisma ordo en Hungario. En la kriza situacio la plej firmaj komunistoj, gvidataj de János *Kádár,* fondis la Hungaran Socialisman Laboristan Partion kaj la Revolucian Laboristan-Kamparanan Registaron. Tiu registaro petis pri interveno la sovetajn trupojn, kiuj restadis en Hungario, kaj parte per ties helpo la ribelo estis subpremita.

La partio kaj la registaro alfrontis duoblan taskon tre malfacilan. Ĝi devis ĉesigi la dogmatisman politikan praktikon, disvolvitan dum la kulto de personeco, kio puŝis multajn bonintencajn homojn en la tendaron de la kontraŭrevolucio; kaj samtempe ĝi devis ankaŭ firme defendi la jamajn atingaĵojn de la socialismo en Hungario kaj elformi taŭgan politikan praktikon.

Slogano de tiu nova politika praktiko estis: „Kiu ne estas kontraŭ ni, tiu estas kun ni!", kontraste al la pli frua „Kiu ne estas kun ni, tiu estas kontraŭ ni". La partio kaj la registaro sisteme likvidis la restaĵojn de la personkulta politiko, rehonorigis maljuste kondamnitajn homojn, punis tiujn, kiuj portis respondecon pro la senbazaj procesoj, kaj forigis ĉiujn el la policaj kaj justicaj organoj, kiuj iel ajn partoprenis en la preparoj kaj organizado de tiuj procesoj. La popolpotenco en la lando rapide solidiĝis, ĉar la homoj klarvidis, ke la tempo de la maljustaĵoj ne plu revenos. Sur la ĝustigita vojo la decida plimulto de la popolo, komunistoj kaj nekomunistoj volonte, kun entuziasmo laboris en la konstruado de la socialismo. La vivnivelo daŭre kreskis, la socialismaj rilatoj fariĝis regantaj sur ĉiuj terenoj de la vivo. Finiĝis la kolektivigo de la agrikulturo: en 1961 jam 90 procentoj de la kamparanoj laboris en kooperativoj. Vigliĝis ankaŭ la kultura vivo. Pluraj verkistoj kaj kulturaj agantoj, kiuj en 1956 estis erarigitaj per la devizoj de la kontraŭrevolucio, rekonis sian eraron, kaj ekagis por la vasta disvolvo de la tutpopola kultura revolucio, por la klerigado de la laboranta popolo.

La 8-a kongreso de la Hungara Socialisma Laborista Partio en novembro de 1962 povis konstati, ke la fundamentoj de la socialismo estas metitaj. Samtempe ĝi difinis la pluan celon: plenan konstruon de la socialismo en Hungario.



Eĉ dum la jaroj de la kulto de personeco ne ĉesis la rapida industriigo de la lando: altforno de la metalurgia kombinato en Dunaújváros



Ruinoj en Budapeŝto fine de 1956

La 1-an de majo de 1957 pluraj centmiloj da laboristoj demonstris sian subtenon al la afero de la socialismo



T. Borbás: Kosztolányi kaj Babits (Fotoj: Somhegyi)

Jarcentoj de la

István Torda

9. La Granduloj de „Nyugat"

Apud Endre Ady kaj Zsigmond Móricz kies karieroj estis prezentitaj pasintfoje, al la unua generacio de la revuo „Nyugat" (Okcidento) apartenis tuta aro da grandsignifaj literaturistoj.

En la sama revuo aperis versaĵoj kaj noveloj de Margit *Kaffka* (1880—1918) kiu estis amiko kaj kunbatalanto de Ady. Ŝi estas la unua granda verkistino hungara. Ŝia plej signifa verko *Koloroj kaj Jaroj,* publikigita en 1912, estas unu el la plej bonaj hungaraj romanoj. Ĝia heroino Magda Pórteleky kun vera virina sincero rakontas la historion de siaj edziniĝoj kaj de sia tuta fuŝita vivo. Pere de tio la leganto povas esti atestanto de historia procezo, tiu de malrapida kadukiĝo de la provinca nobelaro Hungarlanda. La agado de la romano progresas en du tempo-planoj: en la nuno de la rememorado kaj en la pasinto revivigita de la rememoroj. Sur la paĝoj de la libro pulsas interna ritmo de la re- kaj revenantaj memoroj, sentoj, humoroj. Tio parencigas ĝin kun tiuj Eŭropaj romanoj (ekz. tiuj de Marcel *Proust* aŭ de Virginia *Wolf),* kiuj simile manipulas pri la tempfaktoro.

Mihály *Babits* [Babiĉ] *(1883—*1941) estis grandefika personeco de la hungara literaturo inter la du mondmilitoj. Li ekis kiel provinca mezlerneja instruisto, poste li instruis en apud-Budapeŝta urbeto, post kelkaj jaroj jam en la ĉefurbo. Ekde la komenco de la unua mondmilito li estis unu el la redaktoroj de „Nyugat". En la unuaj verkoj Babits montras sin adepto de la estetiko „l'art pour l'art" (arto por arto). Li estis virtuozo de la versformoj, tiu de la poezia lingvaĵo, sed ĉe la radikoj de tiu virtuozeco rekoneblas senĉesa serĉado fare de filozofema spirito, direktita al la konado. La registaro de la burĝ-demokratia revolucio de 1918 nomas lin katedrestro de la Budapeŝta Universitato. Dum la burĝ-demokratia kaj proleta revolucioj en 1918—1919 Mihály Babits energie aktivis en la socipolitika vivo. Tial post la malvenko de la Konsilia Respubliko li estis eksigita, kaj en la gazetaro komenciĝis kampanjo kontraŭ li. Lia poezio, baraktanta en animajestetikaj krizoj, serĉis novajn vojojn. En liaj poemoj, montrantaj parencajn trajtojn kun la pesimismo, speguliĝas seniluziiĝo kaj direktoperditeco. La travivaĵo de lando turmentita de krizoj vokis el li voĉojn de malespero. Ĉe la fino de la 20-aj jaroj tamen reaperis en li la ekvilibro. En liaj studaĵoj, romanoj, versaĵoj tute egale montriĝas humanisma sinteno defendanta valorojn de la kulturo, la sencon de la literaturo. Ekde la komenco de la 30-aj jaroj kiel redaktoro de „Nyugat" kaj kuratoro de la tiutempe plej grava literatura premio hungara, la t. n. Fonduso Baumgarten, Babits ekhavis grandegan aŭtoritaton. En la tempo de la plifortiĝanta faŝisma diktaturo Babits komprenis erarojn de sia antaŭa vojo. Tiaj, verkoj, kiel *Libro de Jona* (1940) atestas pri lia fideleco al la altaj idealoj samtempe ili pruvas la bezonon de batalema sinteno. La menciita verko estas versa konfeso, aperanta en la formo de Biblia rakonto. La doloroj, kaŭzitaj de plifortiĝanta malsano — laringokancero — inspiris la poeton verki poemojn klasike purajn. La lirikaĵoj faras nur parton de la Babits-a verkaro. Lia granda romano, *Mortidoj* (1927) pentras bildon pri la hungaraj intelektularo kaj la „mezklaso" de la jarcentfino. Li verkis ankaŭ rakontojn kaj novelojn. Liaj studaĵoj, atestantaj pri escepta erudicio, pri kapablo al la delikata analizemo, plenigas plurajn volumojn. Natura esprimilo por Babits estis la tradukarto. Lia tradukista ĉefverko estas la senpare bela interpretado de la *Dia Komedio* de Dante Allighieri.

Apud Mihály Babits grandan signifon havis la verkado de Dezső *Kosztolányi* [Kostolanji] (1885—1936). Li naskiĝis en la provinca urbeto Szabadka (nun Subotica en Jugoslavio), en intelektula familio. Sed li iĝis ne provinca instruisto, kiel Babits, sed ĉefurba ĵurnalisto. Liaj poezio kaj tradukarto subite havis sukceson. En la pecoj de lia poemciklo *Lamentoj de Kompatinda Infaneto* (1910) montriĝas virtuoza tekniko de la versfarado kaj la tuta arsenalo de la t. n. „nov-arta" stilo *(Jugendstil, art nouveau, modern style),* ĝiaj koloroj kaj ĝia riĉo. En la liriko de Kosztolányi, estinta adepto, poste kontraŭulo de la proleta revolucio, okazas simila krizo kiel en la Babits-a. Li brave defendis kontraŭ ĉiuj tendencoj principon pri la senlimaj rajtoj de la individuo. En la lastaj jaroj de lia vivo pli kaj pli pure kaj noble eksonas lia voĉo pri la korpa suferado kaj tiu de la humanista protesto. Kosztolányi estis neatingebla artisto de la hungara lingvo li konis ĝiajn sekretojn. Pri tio atestas ankaŭ liaj prozaĵoj. Liajn perfekte verkitajn novelojn karakterizas vivkono, krome proporcia komponado, inklino al la ekzotiko kaj delikata ironio. Li en 1919 publikigis la romanon

hungara literaturo

Alaŭdo. tiun ĉi senkompatan senmaskigon de la mensogoj de la etburĝa vivo. Lia romano *Nerono, la Sanga Poeto* (1922) prezentas artiston kun senlima vanteco, kio finfine ankaŭ lin mem gvidas al la pereo. Kosztolányi ne idealigas siajn heroojn-humanistojn, ankaŭ Nerono ĉe li ne estas diablo, nur preskaŭ kompatinda, malfeliĉa, poltrona ulo. La *Ora Flugildrako* (1924) estas pedagogia romano. Ĝia protagonisto, mezlerneja instruisto estas erudicia, humana homo, kiu tamen ne kapablas eduki la malbonajn lernantojn kaj la bonajn ne povas igi siaj disĉiploj, finfine li pli multe malutilas ol utilas. Kosztolányi sugestas: en tiu epoko la virtuloj fiaskas, ĉar ili vivas izolite, pasive. La romano *Anna Édes* (1926) estas bildo pri la „katolika-kristana moŝta mezklaso". Ĝia agado estas tragedio de servistineto ĉe moŝta familio. Ankaŭ en tiu ĉi ĉefverko, same kiel en aliaj romanoj de Kosztolányi, rekoneblas spuroj de la Freud-a psikologio, sed la verkisto la kialojn de la aberacio ĉiam trovas en la socia vivo.

La plej malfeliĉan sorton el la poetoj de la unua generacio de „Nyugat" havis Gyula *Juhász* [Juhas] (1883—1937). Ĉiu tendenco konsideris lin sia adepto, la plej grandaj verkistoj estis liaj amikoj, tamen Juhász vivis sur la rando de „Nyugat", plejmulto de liaj verkoj aperis en provincaj periodaĵoj. Li sentis sin ekzilito, vivis kiel „vilaĝa poeto" en la provinca urbo Szeged.

Lia liriko eminentas ne pri varieco, bunteco de la formoj, Li estis granda artisto pri unu stilo, unuspeca voĉo, tiu de la etaj formoj, tiu de la lakonisme montrita pejzaĝo. La ampoezio de Gyula Juhász, la fama Anna--ciklo same enhavas eminentajn pecojn. En la dudekaj jaroj la Juhász-a poezio esprimas veojn de la lando suferanta pro kontraŭrevolucia reĝimo. En kortuŝaj bildoj aperas la hungara pejzaĝo, la sorto de la Hungarlanda kampularo. Gyula Juhász simpatiis ankaŭ kun la revolucia laborista movado, lia poezio esprimas fidon pri nova mondo, pri tiu de la laborantaj homoj.

Árpád *Tóth* [Tot] (1896—1928) kreis poezion, kiu konsideratas la plej unuspeca en la tuta hungara liriko. La reganta etoso de tiu poezio estas dekomence ĝisfine doloro, tristo de homo, vane sopiranta pri amo, pri feliĉo. Lia ĉefa sinteno estas la rezigno. La re- kaj renoviĝanta adiaŭo pruvas, ke la poeto senĉese persistas pri siaj revoj, kaj malgraŭ la ŝajne definitiva rezigno, la poeton senŝanĝe regas la miraklo de la vivo. Árpád Tóth dum la tuta vivo troviĝis sub premo de la tuberkolozo kaj sub tiu de la malriĉo, tamen lia vera riĉo, la homeco kaj la mildo ĝismorte sufiĉis por li. Tiu poeto estas unu el la plej elstaraj tradukistoj hungaraj.

Frigyes (Frederiko) *Karinthy* [Karinti] (1887—1938) en la vasta publiko populariĝis kiel humuristo. Sed li vere estis unu el la plej multfacetaj talentoj de „Nyugat". Lia kolekto *Tiel Vi Verkas* (1912) estas unika ekzemplo de la literatura parodio. La multaj postaj eldonoj ĉiam iĝis pli riĉaj. Tiu verko konsidereblas unuspeca literaturhistorio de la epoko. Karinthy en siaj romanoj, noveloj kaj teatraj verkoj per rimedoj de la fantaziaĵo, utopio, grotesko malfermas subkonsciajn profundojn de la homa animo, rakontas pri la kontraŭdiroj de la socio, pri la konataj kaj dezirataj akiraĵoj de la natursciencoj. Lia ĉefverko *Vojaĝo ĉirkaŭ mia kranio* (1937) estas terurige preciza montrado de la cerb-operacio de Karinthy. Ĝi estas triumfo de la artisto, venkanta la timon. (F. Karinthy forte simpatiis kun la ideo de la internacia lingvo, li estis eĉ prezidanto de la Hungara Esperanto-Societo. — Red.)

Modeloj de Milán *Füst* [Füŝt] (1888—1967) estis ne verkistoj de la jarcentfino. Radikoj de lia verkaro iras al la Biblio, al Tolstoj, al Shakespeare. La poeta-verkista sinteno de Milán Füst dum lia tuta kariero restis la sama. Liaj versaĵoj estas preskaŭ liturgiaj tekstoj, strangaj korusaĵoj. En ili speguliĝas fremdiĝo de la mondo, montriĝanta pli kaj pli malracia, krome soleco, timo, mortfobio. Liaj dramoj kaj prozaĵoj same estas individuaj verkoj, memorigantaj pri neniu alia verkisto. Ankaŭ eksterlande havis sukceson romano de Milán Füst, titolita *La Historio pri mia Edzino* (1942), pentranta ekscitan pitoreskan mondon. Ĝi kvazaŭ ilustras la Füst-an estetikon, laŭ kiu la baza temo de la arto estas la malfeliĉo.

La „terura infano" de la granda generacio estis Józsi Jenő *Tersánszky* [Terŝanski] (1888—1969), kiun karakterizis bohema vivo, senpera konduto. Li famiĝis per eminenta romano pri la unua mondmilito — *Ĝis Revido, Kara* (1917). Li verkis multege: al ĉiuj periodaĵoj, ĉiuspecajn verkojn, inter kiuj egale troviĝas ĉefverkoj kaj fuŝaĵoj. Lia plej konata verko estas novelciklo *Marĉjo Kukolo,* temanta pri hungara praido de Lazarillo de Tormes. La protagonisto de la ciklo estas ekstersocia vagulo, kiu dum gajaj aventuroj vidas la mondon „de malsupre." La verkado de Tersánszky staras malproksime de ĉiu laŭmoda tendenco de la epoko, de ĉia literatura afektado. Li prezentas la realon per praaj, simplaj rimedoj: paroligo kaj agigo.

El la hungara: **P. A. R.**

Kris Long

Post vespero de hungara poezio

Mi sentas sangon en la buŝo,
ĉasinte aŭtobuson
post horoj antaŭ poezio.
La sento taŭgas: io
profunda trinkis min, elĉerpis,
novalon plugis, erpis
nivelon, kiun mi ne tuŝus,
la propra sang' eltusas.

B. Prus LA FARAONO

Kiel la bildoj montras, faraono Ramzes XIII povis diri „ne" eĉ al la plej belaj virinoj ... Lin allogis taskoj pli gravaj, eĉ se ne tiom agrablaj.

Sur la lasta bildo li ekiras sur vojo, kiu kondukas tra multaj bataloj kaj tragedioj al ... -sed tion vi povos ekscii, aĉetante la luksan bildrakonton La Faraono, faritan laŭ la romano de B. Prus.

La libro aĉeteblas ĉe ĉiuj esperantistaj libroservoj, aŭ ĉe landaj asocioj. Esperantistoj en Sovetio povas mendi ĝin pere de la Estona Filio de ASE. Mendojn oni sendu (nur en Sovetio) al: K-do Johannes Palu, 200016 TALLINN, Solme 21, Estona SSR. Jen, la bibliografiaj indikoj de la libro:

B. Prus: La Faraono. 48 p., 24 cm. Kun koloraj kovriloj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1980. ISBN 963 571 069 0. Prezo: 18,— forintoj (Por Hungario), 4,80 ned. gld. (por ne-socialismaj landoj), 1,10 rubloj (Por Sovetio).

Péter Dobai

ELSUĈILO

La nadlo ruĝis, moviĝis inter cent dudek kaj cent tridek kilometroj. Tiba forte tenis la direktilon, la pejzaĝo preterflugis ilin; la urbo, el kiu ili venis, pli kaj pli malproksimiĝis.

— Ĉu la florkrono ne frakasiĝos en la valizejo? — demandis Marika.

— Ne. Certe ne. Mi ĉirkaŭis ĝin per kartonskatoloj.

— Ni estus devintaj ĝin meti sur la antaŭan parton de la aŭto, kiel estas kutime sur la tramo — diris Marika.

— La unua policano haltigus nin — respondis ride Tiba. En la retrospegulo li rimarkis, ke Moskviĉ provas ilin antaŭi. Li akcelis per gasallaso, li tiriĝiŝ ĝis la rando de la landvojo kaj atentis kiel penadas la aŭto venanta malantaŭ ili, ĝis fine tiu ĉesis signi per la indekso. Tritikkampoj, maizkampoj, junaj arbaroj, benzinstacioj, ĉardoj kaj aŭtostopantaj geamantoj restis malantaŭ ili. Li ĝuis la landvojon, la rapidecon, la misteran perspektivon de la griza betono sub la aŭton kureganta, en kiu la fortoplena movo kvazaŭ senhalte solviĝas, li ĝuis la malaltan, senfortostreĉan sonon de la motoro, ĝian perfektan funkciadon kaj la buklojn flugadantajn apud li, la ekzistaĵon de Marika.

— Kion vi sonĝis, Mari? — li demandis sian edzinon.

— Nenion.

— Nenion?

— Nenion.

— Ĉu vi estas incitita....

— Kial ni iras al la entombigo? Ni perdas unu tagon el nia vojaĝtempo...

— Vi scias, ke le sinjoro instruisto estis la plej bona amiko de mia patro.

— Vi ne amis vian patron kaj nun vi parolas ĉiam pri li.

— De kie vi prenas, ke mi ne amis mian patron?

— Mi konjektas, Mi petas kiseton.

Marika ricevis la kiseton.

— De kie vi prenas tion?

— Vi diris, ke li drinkis multe kaj tio ĉagrenis vian patrinon kaj ankaŭ vin. Fine li ne trovis la lernoĉambron...

— Kio do?

— Ke li drinkis multe... ne veturu tiel rapide!

— Mia patro estis mia patro. Mi amis lin.

— Jes, nun certe, ke li jam mortis. Sed en la hospitalo vi ne vizitis lin...

— Ne, ĉar mi ne volis, ke li petu pardonon de mi...

— Kial agonianto estus devinta pardonpeti?

— Li sciigis min, ke mi vizitu lin en la agoniantejo, li volas min peti pardoni al li. Ankaŭ mi ne scias, kial.

— Nu, vi neniam scios ĝin. Kaj kiu estis lia amiko?

— Ankaŭ tiu estis instruisto kiel la maljunulo.

— Je kioma horo estos la entombigo?

— Tagmeze.

— Ĉu ankaŭ kun pastro?

— Jes. Kial?

— Antaŭlonge mi vidis pastron.

— Ĉu via bofratino iris jam hejmen? Ĉu via frato estos preta ŝin enlasi?

— Mi ne scias. Ŝi iros hejmen, se tiel plaĉos al ŝi. Ŝia afero. Ni ne povas enmiksiĝi. Ni parolu pri io alia.

— Miaparte, ni povos silenti ĝis Ostia.

— Ĉu vi ofendiĝis? Mi petas kiseton.

Ŝi ricevas kiseton. La landvojo. La monteta-valeta pejzaĝo, la folihavaj arbaroj, en la foro la ekbriletantaj akvoj, la mejloŝtonoj de Hungarlando fiksitaj sen mezurado kaj sen tempo, la flavaj aŭ blankaj preĝejturoj en la koro de la vilaĝoj kaj komunumoj.

Tiba ŝaltis la radion: „Estas precize la deka horo. Jen la novaĵoj En Irlando kvar dekkvinjaraj knaboj sub la gvido de pastro, armitaj per bazuko kaj flamblovilo penetris en socialan azilon kaj ili komencis pafadi la blindulojn kaj la surdmutulojn. Post tio la knabteroristoj batalis kontraŭ la policanoj en ludejo. Memvolaj majstropafistoj estingis ilian vivon. Unu policano grave vundiĝis, la pastro en la ludejo ekbruligis kaj forbruligis sin. En Brazilo la karnavalo en Rio finiĝis post sangverŝado. En la profundo de sulfurminejo en Rodezio estas trovita la restaĵo de kadavro de la misiisto Sankta Akazio, la ĉefepiskopo konsekris la minejon, li deklaris ĝin pilgrimejo, la ministoj estis maldungitaj. La vetero: turnovento, sekeco, peniga laboro atendos la ĝardenistojn, junpioniraj trajnoj ekiris al la regionoj de nia patrio por helpi la kolektadon de fruktoj. Ni komunikos novaĵojn tagmeze."

— Tuj ni alvenos, Mari.

— Kion ni faros ĝis oni komencos?

— Kion?

— La enterigon. Ni estus devinta ekvoji pli malfrue. Mi estus povinta dormi ankoraŭ unu horon. Nun ni glutos la polvon...

— Ni ne bezonos atendi la enterigon. Ni metos la florkronon sur la katafalkon de la maljuna pedagogo kaj ni ekiros plu.

— Ostia! La maro! Mi feliĉas, mi amas vin kaj... kaj... kaj mi amas vin!

— Ĉu vi estas feliĉa?

— Jes.

— Pro la vojaĝo? — demandis ridete Tiba.

— Ne nur pro ĝi. Tial, ĉar mi povos esti kun vi la tutan tagon, matene vi ne foriros, vespere vi ne alvenos nervoze kaj suspekteme kvazaŭ vi ne hejmenvenus. Ni estos senĉese kune.

— Suspekteme? Ĉu mi?

— Kiel vi kutimis: kion mi faris la tutan tagon? Vi ĉiam demandas.

— Tio estas evidenta, ĉu ne?

— Mi petas kiseton.

Ŝi ricevas kiseton. Ili atingis la vilaĝon. Marika volis trinki glaseton da konjako. Ili eniris la drinkejon. Mari trinkis la konjakon. Ilia kapo doloris pro la aŭgusta varmego.

— Mi ne iras en la tombejon. Mi atendos vin ĉi tie en la drinkejo.

— Laŭ via plaĉo — diris mallaŭte Tiba. Li eliris, per la sparkadŝlosilo li ekfunkciigis la motoron kaj li veturis en la tombejon. Inter la tomboj, sur la herba, kampoflora vojeto staris la kampuli-

noj nigre vestitaj. Ĉefronte de la grupo tri viroj atendis, ili estis ebriaj, el sub ilia nigra ĉapelo ŝvito fluetis sur ilian tempion. La virinoj fortiriĝis de ili kaj kiam iu el la maljunuloj elprenis botelon da brando, li donis ĝin laŭvice al la aliaj, poste ankaŭ li trinkis el ĝi, tiam unu el la virinoj faris al si la signon de kruco sur la brusto.

Tiba alrigardis sian horloĝon. Pasis la dekunua. Li elprenis la florkronon el la valizejo. Li ekiris al la kadavroĉambro. La pastro sidis sur benko, vestita nigre-blanke, lia vizaĝo dormis, la helpantoj staris en la ombro.

— Ĉu vi venis al la entombigo? — demandis juna virino Tiban, verŝajne la nova instruistino.

— Jes, fraŭlino.

— Ĉu al la enterigo de la instruisto?

— Jes, ja.

— Oni ne trovas la ŝlosilon de la kadavroĉambro. Ne eblas malŝlosi la ejon de la katafalko.

— Kaj la maljunulo?

— Tiu estas en ĝi. Nun estas serĉataj la tombfosisto kaj la tombejgardisto, sed povas esti, ke ili foriris el la vilaĝo, ĉar oni nenie vidis ilin. Ili estas malnovaj kunuloj, ili ĉiam kune drinkas. Eblas, ke ili revenos nur vespere. En la alia vilaĝo estas kermeso. Mi vetus, ke ili estas tie.

— Kiel povas tio okazi?

— Nu, la ĉagreno, sinjoro.

— Ĉu mi povus peti vin transdoni ĉi tiun florkronon...

— Al kiu mi transdonu ĝin?

— Al iu parenco au...

— Li ne havas parencon.

— Tiam estu kompleza transdoni ĝin al funebranta knabo, mi devas foriri. Mia edzino atendas min en la drinkejo. Ni veturas al Italio, nia vojo kondukis preter la vilaĝo, la instruisto estis amiko de mia patro...

— Portu ĉi tiun florkronon al la tombfoso. Metu ĝin apud la alian.

— Jes.

— Mi tre dankas vin pro via komplezo, fraŭlino.

— Diru, ĉŭ vi kunveturigus min ĝis la drinkejo?

— Volonte. Ja, vi devas atendi, ĉu ne? Ĝis kiam oni povos ĝin malfermi...

— Mi pensis jam eĉ pri tio, ke la maljunulo enŝlosiĝis en la kadavroĉambro, la tombfosisto kaj la gardisto pro timiĝo forfuĝis.

— Maleble. Oni baldaŭ malfermos ĝin.

— Per hakilego — diris la instruistino. Granda hundo alkuris ŝin. Ĝi preskaŭ puŝe renversis Tiban, kiam ĝi ĉirkaŭkuregis la instruistinon.

— Ĝi nomiĝas Ĉasisto. Mia hundo. Ĝi ree disŝiris sian ĉenon.

— Bela besto.

— Vere. Nu, ĉu vi kunveturigas min?

— Venu. Kiuj estas tiuj viroj?

— Tiuj tri? Vilaĝaj instruistoj, ili venis al la entombigo.

Ili enaŭtiĝis. La hundo ensaltis sur la malantaŭan sidlokon. Tiba vidis en la retrospegulo nur la nigran buŝegon de la hundo, ĝiajn pintigitajn orelojn, ĝian elpendantan langon. Ili eniris la drinkejon. Marika sidis ĉe la angultablo, ŝia malpeza trikotrobo suprentiriĝis sur ŝiaj femuroj, ŝi krucmetis siajn krurojn, kaj ĝuste ekbruligis cigaredon, kiam ili enpaŝis. Ŝi rigardmezuris la instruistinon. Ankaŭ tiu ŝin.

— Kion vi trinkas? — demandis la instruistino. Ŝi iris al la butiktablo.

— Mi, konjakon — diris Mari.

— Mi, sodakvon, sed ne penadu, mi petas vin, sidiĝu, mi alportos — diris Tiba. La instruistino sidiĝis apud Mari. Tiba alportis la du glasetojn da konjako kaj la sodakvon por si.

— Mi ne kutimas trinki konjakon, nur aliajn brandojn. Egale. Je via sano.

— Je la via — diris Mari.

— Kiom da glasetoj da konjako vi trinkis, Mari? — demandis duonvoĉe Tiba.

— Tri.

— Do, ĉi tiu estas la kvara...

— Nu, kaj tiam kio do?

— Nenio.

— Ĝuste. Mi petas kiseton.

— Vi dormos dumvoje senĉese. Ni devas ekiri — diris Tiba.

— Vi tranoktos en Venecio, ĉu ne? — demandis la instruistino.

— Eblas. Sed povas esti, ke en Triesto aŭ Duino...

— Pro la elegioj?

— Ho ne. Laŭokaze. Kiam mi laciĝas. Estas longa la vojo.

— Ĉu via edzino ne ŝoforos?

— Vi povas vidi...

— Kaj en kiu direkto vi veturos? — demandis la instruistino.

— Al Firenze. Tie ni pasigos du tagojn pro la bildarejoj. Sed unue al Verona kaj Sirmione, kie vivis Catullus. El Firenze al Siena, de tie al la etruskaj tomboj, al Tarquinia, poste al Romo. Poste al Napolo, Pompejo, Positano, Amalfi...

— Kiel bone estos al vi, mia Dio!

— Do, ni adiaŭas, fraŭlino. Ni devas ekvoji. Ĉion bonan! Ĉu ni reveturigu vin al la tombejo?

— Mi dankas, ne. Mi restas ankoraŭ. Oni kunportos min per motociklo. Mi dankas al vi pro la konjako. Adiaŭ!

Mari stariĝis, ĝustigis sian hararon, kisis la vizaĝon de la instruistino, kaj eliris el la drinkejo. Tiba sidiĝis ĉe la direktilo, ili ekiris. Ili atingis la landvojon. La nadlo saltetis super la cent kvardek kilometroj. La suda limo de Hungarlando jam ne estis malproksima. Ili atingis malantaŭ grizan cisterno-kamionon. Tiba devis malpliigi la rapidecon. Antaŭ la cisterno-kamiono iris du kromĉaraj ŝarĝaŭtoj. Mari sidis kun fermitaj okuloj apud Tiba.

— Ĉu vi dormas? — demandis la viro.

— Ne. Mi petas kiseton. Kia estis la entombigo?

— Ĝi poste okazos. Malaperis la tombfosisto. Kaj la mortinto ne estas mortinta.

— Ne ŝercu... Ĉu vi estas kolera, ĉar mi ne iris kun vi?

Tiba provis antaŭi. La kontraŭa trafiko devigis lin resti malantaŭ la cisterno-kamiono.

— Kial vi veturas tiel malrapide? — demandis Mari.

— Ĉar mi ne povas antaŭi la elsuĉilon — respondis Tiba.

— Kion?

— La elsuĉilon.

— Kio estas tio?

— La elsuĉila cisterno-kamiono de la Entrepreno por Termastrumado.

— Do, ĝi estas plena.

— Jes, plena.

— Kiel bonege estos naĝi en la maro... Ĉiumatene lasu min sur la plaĝo, dum vi vizitados la galeriojn.

— Ĉu tiuj ne interesas vin?

— Ne, mi volas prefere sunbani kaj naĝi.

— Hieraŭ vi legis ankoraŭ la gvidlibron, kiel admirinde estos vidi la Medici-kapelon, stari sur la Placo de Sankta Petro, la fontano Trevi, la Hispana Placo, la Forumo, la Koloseo, la baziliko Santa Maria Maggiore, la Trastevere, la foiro ĉe la Porta Portese, la vilao Julia, la Vatikano...

— Mi volas sunumi kaj naĝi en la maro. — La Medici-kapelo ne interesas min. Kial ni ne iras pli rapide?

— Malfermu viajn okulojn. Mi ne povas antaŭi la elsuĉilon.

— Kion?

— Tiun cisterno-kamionon antaŭ via nazo. Certe, ke ĝi estas plena, tial ĝi iras tiel malrapide. Tiu cisterno-kamiono elsuĉas ĉion el la fekaĵujoj, kloakoj, ekskrementaj rezervujoj.

— Aha.

Tiba provis veni rapide antaŭen el malantaŭ la cisterno-kamiono, sed la renkonte venanta aŭto devigis lin reiri. Marika ekskuetiĝis sur la sidloko. Ŝi rimarkis krakmanĝejon apud la landvojo.

— Ni haltu ĉi tie.

— Kial?

— Hm. Mi bezonas pisi.

— Bone.

Mari eliĝis, ekbruligis cigaredon, eniris en la krakmanĝejon, ĉe la butiktablo ŝi trinkis glaseton da konjako. Tiba postiris ŝin, li petis Coca-Colan.

— Propre kial... foje vi povus rakonti jam, kial denuncis vin viaj kolegoj?

— Ĉar ili ne povis fari ion alian.

— Kiom stultaj estas la homoj... ili faras malbonon unu al la alia, anstataŭ lasi sin reciproke en paco. Kiom vi frakasiĝis... ili volis ĝuste tion. Ĉiu ĉiam frenezetiĝas. Jen, kion Samoŝi diras: permesu al ili tion, kion ili volas por ke ili ne volu tion...

— Kiu estas Samosi?

— Mia kuracisto.

— Ĉu vi estis kun li?

— Kiel do, kun li? Eble ĉe li. Li estas mia kuracisto. Vi scias, kiu estas li.

— Mi ne sciis, ke li estas ankaŭ filozofo.

— Ni ekveturu, ĉŭ bone?

— Bone. Vi volis halti. Ĉu vi kaj li estis en bona interrilato?

— Jam mi diris, ke ne.

— Vi ne diris.

Ili reenaŭtiĝis. Tiba baldaŭ veturis kun la kutima surlandvoja rapideco. Li tenis la rapidecon de cent kvardek kilometroj. Ili alproksimiĝis al la landlimo. Antaŭ vilaĝo ili denove atingis la elsuĉilon. Tiun saman.

— Antaŭu fine ĉi tiun bordelan cisterno-kamionon.

— Ni troviĝas en vilaĝo.

— Eĉ tiam.

— Poste, sur la landvojo. La trafikaj reguloj estas devigaj por ĉiu. Pleje por la filozofoj. Almenaŭ tiom por ili, kiom por la aliaj homoj.

— Lasu min en paco.

— Ĉu vi estis kun li?

— Ne pridemandu min! Mi enuas vin. Mi sciis anticipe, ke dum la tuta vojo vi pridemandos min. Sed por tio ne estus necese vojaĝi al Italio.

— Mi ne pridemandas vin. Mi timas, ke en ĉi tiu vilaĝo ne estos drinkejo.

— Lasu min, ĉu bone?

— Nu, bone. Mi pensis, ke ni rajtas fari demandojn unu al la alia pri kio ajn, kaj ni rajtas respondi je ili.

— Ĉu vi kredis tion pri vi mem? Ĉu vi ne memoras, kio estas ĉiam la fino, se mi rakontas, kiun mi konis antaŭ ol mi konatiĝis kun vi? Ĉu vi ne furiozas pro tio, kion vi volis scii? Plej bone estas, se ni ne demandas unu la alian. Car ni ankros ĉe Agnesa Jákó, ŝi estis emimenta virino, kiel vi konfesis al via patrino... ne al mi, al via patrino. Sed diru, kiun interesas, kiu estas eminenta por vi kaj kial?

— Trankviliĝu jam. Rigardu la vojon. Tuj ni atingos la landlimon. Kaj morgaŭ la maro! Vi pretigis vin la tutan jaron por ĉi tiu vojaĝo. Mi sola vizitos la muzeojn. Vi estos sur la plaĝo. Ĉiunokte mi rakontos al vi, kia estas Romo. En Romo. Ĉu bone? Kompreneble la grandaj galerioj ankaŭ dumnokte estas viziteblaj.

— Fakte? Mi petas kiseton. Ĉu la bildoj estas prilumitaj?

— Jes.

La elsuĉilo akcelis sian rapidecon, ĝi ĝirlampe signis, antaŭis la draŝmaŝinon, antaŭ kiu iris rikoltdraŝmaŝino, granda kiel familia domo. Tiba sekvis la cisterno-kamionon.

— Morgaŭ ni estos jam en Romo, en la Eterna Urbo — diris Tiba.

— Ĉu la maro estas malproksima de Romo? — demandis Mari.

— Ostia distancas nur je tridek kilometroj, sed ni iros al Terracina.

— Kial?

— Vi vidos. Kiam ni estos tie, vi ne demandos. Ĝi estas tre bela.

— Ni amoros en la maro, ĉu bone? Vespere en la ondoj. Onidire, ĝi estas diable bona.

— Ĉu la kuracisto diris tion? — demandis Tiba.

— Ne. Katolika sacerdoto flustris ĝin en mian orelon, en mia aĝo de dektri jaroj, kiam li enbuŝigis al mi la hostion.

— Estas fantaste.

— Jes.

Tiam li veturis sur la maldekstra vojrando. El malantaŭ la cisterno-kamiono, kiun li sekvis, li ekvidis la okradan, pezan traktoron venantan kontraŭ la kamiono: tiu tiris post si flosgruon metitan sur radojn.

Mari dormis. En ŝia mano brulis la cigaredo. La peza traktoro eksonorigis sian hupon: estis sono simila al ŝipfajfilego. Ankaŭ la ŝoforoj de la draŝmaŝino kaj de la rikolt-draŝmaŝino eksonorigis la landvojan hupon.

La elsuĉila cisterno-kamiono jam ne povis retiriĝi sur la dekstraflankan vojstrekon. Ĝi iris ĝuste paralele apud la draŝmaŝino. Ĉe la vojkurbo kiel dronanta krozŝipo, aperis antaŭ ĝi la traktoro kun la flosgruo.

La elsuĉilo bremsis. Per sia aerbremso ĝi tuj stopiĝis kaj kun granda klakego ĝi haltis en la tanksimila motorujo de la traktoro.

La maldensa malpuregaĵo falegis malantaŭen el la cisterno krevinta en du pecojn, kvazaŭ oni malfermus turbinon aŭ kluzon. Ĝi tute plenkovris tiujn tri aŭtoruinojn, kiuj frakasiĝis unu sur la alia, kvazaŭ mem kulpigante unu la alian pro la katastrofo.

Tradukis: D-ro István *Nagy*

Klarigo (laŭ PIV)

ćardo: hungara stepa aŭ kampara drinkejo

bazuko: tubo, kiu pafas kontraŭtankajn fuzaĵojn

kermeso: publika, jara festo de la loka preĝejo

krakmanĝejo: speco de restoracio, kie oni manĝas stare kaj rapide.

PANORAMO

János Kádár, unua sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio akceptis la delegacion de la Kristana Packonferenco en la Parlamentejo

Eklezioj por paca mondo

Je invito de la Ekumena Konsilantaro de la Hungarlandaj Eklezioj, la Kristana Packonferenco (KPK) aranĝis en majo *seminarion* en Budapeŝto pri la sekvaj temoj: Malstreĉiĝo kaj veko je konfido en 1980, ties neceso, eblecoj kaj aspektoj; la taskoj de la eklezioj kaj unuopaj kristanoj por preparo de la 2a postkonferenco de la Helsinka konferenco, aranĝota en Madrido.

La seminarion partoprenis 65 personoj el 17 Eŭropaj landoj, el Usono, Latinameriko, Afriko kaj Azio.

Porcelanaj artaĵoj

La *Fabriko Zsolnay* en Pécs produktas krom teknikaj kaj mastrumaj porcelanaĵoj ankaŭ dekorobjektojn el porcelano, fajanco kaj eozino. Ili estas vaste rekonataj ankaŭ eksterlande, ne lastavice tial, ĉar en la fabriko oni severe zorgas pri la kvalito de la artikloj. Estonte la eozinproduktaĵoj permane pentritaj estos speciale numeritaj, kaj ĉiuj ricevos laŭ tiuj numeroj ankaŭ malgrandan atestilon.

Amatoraj artistoj

Belartistaj rondoj estas utiligeblaj de la hungaraj laboruloj multloke por eduki sin en la belartoj. Tiuj funkcias en kulturdomoj de sindikatoj, komunumoj, fabrikoj, grandaj entreprenoj, kaj ebligas kunvenon de amatoraj pentristoj, skulptistoj, desegnistoj k. a. La subtenanta instituto prezentas al ili krom la ejon la necesajn ekipaĵojn kaj precipe konsilanton, instruanton, sub kies fakscia gvido povas disvolviĝi la talentoj.

Dum somero oni organizas por tiuj rondoj ankaŭ „artistajn tendarojn" en pitoreskaj regionoj. Kompreneble nur malmultaj el la amatoroj iĝas profesiuloj, la vera celo estas multe pli la ĝuo de la arta kreado, la valora pasigo de l'tempo, la persona riĉiĝo per artaj valoroj.

Tamen foje eliĝas ankaŭ eminentaj artistoj el tiuj rondoj,

Lertaj manoj pentras la figurojn



En la eozin-metiejo



Ágnes Róza Vető: Nagymaros

PANORAMO

Hans Richter, Gerald Oskamp, Ivan Koĵuharov en la solenaĵo

Konkurso por dirigentoj

El dekkvar landoj 43 konkursantoj partoprenis printempe la 3-an Internacian Dirigento—Konkurson, aranĝitan de la Hungara Televido.

La antaŭkonkursoj okazis en la okcidenthungarlanda urbo Szombathely pere de tri eminentaj ĉefurbaj orkestroj. La ĵurion partoprenis reprezentantoj de mondfamaj orkestroj, de diverslandaj radio- kaj televidostacioj, muzikagentejoj, kritikistoj. Balotrajton havis ankaŭ la spektantoj de la televid-prezentadoj pertelefone aŭ letere.

En la finalo konkursis jam nur ses dirigentoj, en la ĉefurbo. La fina solena koncerto okazis en la Operdomo fare de la venkintoj, laŭvice: Gerald H. M. *Oskamp* (Nederlando), Ivan *Koĵuharov* (Bulgario) kaj Hans *Richter* (FRG). Inter aliaj ankaŭ la kontribuintaj orkestroj premiis la kvalitojn de la junaj muzikistoj, invitante ilin por direkti ĉe ili venontjare koncerton.

---

ankaŭ en maljuna aĝo post peze tralaboritaj jardekoj. Tio okazis al s-ino Ágnes Róza *Vető* — kies edzon, iam aktivan esperantiston en Ujpest ankoraŭ memoras malnovaj esperantistoj. La Fondaĵo Belarta jam akceptis ŝin inter la profesiaj pentristoj, kaj ĉi-somere estis organizita en Budapeŝto ŝia unua memstara ekspozicio — en ŝia aĝo de 68 jaroj.

IKARUS flugis ĝis 50 000

La entrepreno Ikarus de dudek jaroj havas aŭtobusfabrikon ankaŭ en Székesfehérvár. La ĉi tie fabrikitaj veturiloj trafikas sur vojoj de preskaŭ ĉiuj kontinentoj. Ĉi-printempe la kvindekmila aŭtobuso finpretiĝis en tiu granda fabriko. La jubilea aŭtobuso transportos pasaĝerojn en Sovetunio.



Antaŭ malnovaj teatraj afiŝoj pri dramoj de Schiller

Schiller — ekspozicio

Okaze de la 175-jara datreveno de la morto de Friedrich *Schiller*, la Kultura kaj Informa Centro de GDR en Budapeŝto prezentis ekspozicion de teatraj afiŝoj pri la unuaj prezentadoj de liaj dramoj en Hungarlando kaj de aliaj interesaj dokumentoj rilate la grandan germanan verkiston.

Moderna, estetika, komforta estas la gastigado ce

„KERIPAR" SNACK BUTIKTABLO

„KERIPAR" Entrepreno Produktanta Maŝinojn kaj Instalaĵojn por Komerco

Budapest VI.,
Népköztársaság útja 43.
Telefono: 313-124 Telekso: 226237

KERIPAR

REVUO DE REVUOJ

Surpriza „pakedo" alvenis el Svislando: LITERATURA FOIRO kruce „ŝnurita" kaj ŝajne en hungara urbo Veszprém registrita, „afrankita" per hungara „poŝtmarko" kun portreto de K. *Kalocsay.* Nu, por ne streĉi plu la scivolemon: ĉiuj ĉi estis nur desegnitaj — presitaj sur la kovrilo de la revuo, kiu tiamaniere havis ian eksterordinare ĉarman omaĝan aspekton al la hungara skolo de la Ea literaturo. La malbabelan turon de Ea literaturo ja forte altigis, precipe en la poezio la hungaraj verkistoj — kaj pri ties konsekvencoj en la nuntempa E-literaturo artikolis Giorgio *Silfer.* La tuta fenomeno estis tiel koncize — mirindmaniere, mi konfesas — eksplikita en tiu ĉi artikolo, ke oni jam ne povas ties tezojn pli mallonge koncepti ĉiloke — oni devas legi ĝin. Des pli interese ŝajnas, ke la profundiĝo en la radikojn de la „hungara skolo" estis nur kvazaŭ flanke, rande de mallonga meditado pri la traduka ĝenro skizata en tiu artikolo. Mi estus atendinta iom pli longan artikolon en ĉi temo, sed mi esperas, ke Silfer tenas ankoraŭ en sia tirkesto plian tekston.

Cetere Kalocsay aperas ankoraŭ plurfoje en tiu revuo: kaj en eltiraĵo el la preparîganta libro pri Kalocsay (el enkonduko de Ada *Csiszár)* aludanta pri la neologismoj, kaj en interesega studo de Bernard *Golden* (ja, el Veszprém!) pri iamaj (IALA-j) aferoj de la interlingvistika evoluo. En la centro de tiu lingvohistoria studo staras persono, la nelacigebla bibliografo kaj vortaristo Petro *Stojan,* kies longa vivovojo certe meritis la sinsekvajn artikolojn de Golden — kaj la atenton de la eruditaj e-istoj. Verŝajne estos nia honordevo alifoje reveni al tiu artikolserio.

En ĉiu malbono estas iom da bono — tiu proverbo de Zamenhof staras ĉekape sur la REVISTA Portuguesa de Eo, kaj ties citaĵon mi ankaŭ citas pro la „plendprotesto" pro nova kutimo en nia gazetaro. Temas pri skribmaniero modiĝanta ĉe kelkiuj, per kiu oni forigas la majusklojn de sigloj aŭ titoloj, krome trouzas la siglojn. Per tio iĝas foje preskaŭ nekompreneblaj artikoloj, respektive informoj, kvankam io tia ŝajnus sensenca por naiva eksterulo: „La *kle* de *epl* decidis inaŭguri la *zum* kaj *bum,* kunlabore kun *truc* kaj *ŝtruc."* Estas foje *moko* de *koko* tia mallongigemo, negemo de nia gazetaro. Kvankam mi ne volas diri, ke TRUC kaj ŜTRUC majuskle skribite ŝajnas pli majestaj, tamen almenaŭ la *konataj* — aŭ unufoje jam menciitaj en la teksto — sigloj estas skribendaj per majuskloj, por ne misgvidi la bonefidajn legantojn. Sed por fini, kial la citaĵo? Ĉar iom da bono ja troviĝas per uzo de mallongigoj — sed trouzo estas malutila, malbona! Ne forgesu: majusklo estas leganton avertanta *signo.*

En tiu kunteksto mi tuj inspiriĝis, legante poste en HEROLDO (kaj ne *en heroldo,* ja mi nek estas kirurgo, nek anatomo) informon de F. *Lo Jacomo* pri Asocio de E-istaj Matematikistoj. Kompreneble mi ne riskas la legeblecon de mia modesta revuado per nura ĝia siglo IAdEM — tio uzeblas en ilia medio. Sed al mi venis en la kapon la misideo: kio okazus en la matematiko, se ties praktikantoj (egale, ĉu inĝenieroj, teknikistoj aŭ scienculoj) ne severe atentus dum skribo de ekvacioj k. a. pri la ĝustaj literoj, ciferoj, precize distingendaj ankaŭ per majusklo aŭ minusklo (t. e. granda — malgranda literoj)? Ne necesas alta matematika scio por kompreni la bezonon nepran de la preciza apliko. Samtiel estas necese *ne igi konfuza* la ortografion, kio havas la taskon klarvidigi la *sencon* de la teksto. Kaj Esperanto havas ian-tian „internan ideon" ĉu ne?

Kiam en kelkaj E-aj presorganoj bedaŭrinde aperis apogantaj artikoloj pri zodiakaj horoskopaĵoj aŭ pri „supernaturaj" fenomenoj, kaj oni publikigas leterojn de legantoj, kiuj arogas al si „denunci la sciencon", tio estas: la racion, retroirante al epokoj de nescio — tiam estas vera *klera* plezuro legi en KULTURAJ KAJEROJ (nomen est omen) konforme al ĝia kleriga programo pri la majstro de la magiistoj, *Robert-Houdin.* La ĵus forpasinta Eloi *Motillon* verkis klaran biografion mallongan pri la genia iluziisto — cetere homo strange vivanta — kies „neklarigeblaj" mistifikaĵoj, siatempe mondfamaj, devenis tamen senescepte de persona kaj science bazita lerteco. Kion la publiko imagis „miraklo", „nekomprenebla magio", „diablaĵo" — Robert-Houdin mem eksplikis ilin genie imagitaj artifikaĵoj. Pli aŭ malpli poste ĉia miraklo akiras sian klarigon ne supernaturan, sed *simple* (aŭ komplike) naturan!

Ervin *Fenyvesi*

POSTA BILDKARTO akiras gojon!

Granda helpanto
de Esperanto-movado estas la
POŜTA BILDKARTO.

Por prezenti regionojn, urbojn,
artojn de patrio,
por pliprofundigi la amikecon —
en ĉiu epoko
la plej bona rimedo estas
la bildkarto.

Por plivastigo kaj sistemigo
de via kolektaĵo
volonte donas informojn

KÉPZŐMŰVÉSZETI ALAP
KIADÓVÁLLALATA
H— 1366, Budapest, 5. Pf. 110.



Kiu la libron satas, homo
— ne estas tiu de malbono

Hungaraj — kaj fremdlingvaj

— ankaŭ Esperantaj —

libroj, diskoj,

muzikverkoj,

gazetoj, revuoj

el Hungario

Tutmonde disvastigas ilin:
KULTURA
Entrepreno pri Ekstera Komerco
Budapest, POB. 149/H—1389

Zoltán Váli

Okaze de lia 70-jara naskiĝtago oni aranĝis ekspozicion en Budapeŝto, kiu estis (mi pensas) por multaj vera surprizo. Kial? Tial, ĉar ankaŭ Váli apartenas al tiuj pentristoj, kiuj havas talenton, laboras multe, tamen ricevas oficialan rekonon, honorigon, artan premion nur malofte.

Kvankam Zoltán Váli estas ne nur artisto, sed ĝisfunde filo de nia epoko, kaj ĉi tiu virto determinis liajn tutajn vivon kaj verkaron.

Li naskiĝis en 1910. Liaj homa kaj arta maturiĝoj okazis dum mondmilitoj, revolucioj, kontraŭrevolucioj. Li suferis en malliberejoj de la Horthyreĝimo intermilita, poste li batalis en la hispana civitana milito (1938—39), kaj vivis en francaj internigejoj, kiel iama soldato de internacia brigado. En la jaroj de la dua mondmilito li luktis por la libereco de la franca popolo. Li desegnis kaj multobligis afiŝojn kontraŭ faŝista armeo germana. Kompreneble sennome, eĉ liaj amikoj sciiĝis nur post la liberigo de Parizo, ke la popularajn efikajn afiŝojn kreis Váli.

Li ricevis diversajn ordenojn en 1945—46 pro Hispanio kaj Francio, liaj individuaj ekspozicioj en Parizo estis sukcesaj, li rolis kune kun la plej grandaj pentristoj.

Váli revenis en 1948, kaj en Hungario li estis dum jaroj unu el la organizantoj kaj gvidantoj de la arta vivo. Oni povis vidi liajn grafikaĵojn kaj pentraĵojn en ekspozicioj — tamen ankaŭ ili meritus pli seriozan atenton kaj takson.

Lian verkaron karakterizas realismo. Por li estas ĉiam la ĉefa la realaĵo, pejzaĝo aŭ vilaĝo, urbo aŭ iu konstruaĵo, kaj la homo kompreneble, denove kaj denove la homo restas la plej grava modelo, la plej bela temo por Váli.

Li faris multajn portretojn, kiuj prezentis la multflankecon de pentristo: liajn humanismon, ĝeneralan scion kaj artan nivelon.

Franca fraŭlino, 1963 — estas ne nur simpla bildo, de iu junulino, sed spegulas ankaŭ la personecon, riĉan spiriton kaj animon. Eble ŝiaj okuloj kaj nazo, buŝo sufiĉas redoni la nekonfuzeblan individuecon, tamen nia ĝojo estas plurobla, ĉar la harаro kaj la linioj de ŝultroj de Franca fraŭlino kvazaŭ revivigas ŝin.

La *Maljuna viro, 1960* — montras tuj, faris ĝin pentristo, ĉar la maniero, *kiel* li desegnis (per ruĝkreto) vizaĝon, kiel li scias sentigi helpe de atmosfero de bildo tutan vojon de viro, ĉi tiu maniero estas specifa. Ne necesas komentoj, ĉar la portreto parolas mem ĉion pri longa, peza vivo.

Franca fraŭlino, 1963

Kaj fine: *La danĝero ankoraŭ ne pasis!* — En ĝi denove eksonas la konscienco de artisto, kiu ne nur konas sian epokon, sed kiu batalas kaj laboras ĝismorte por la progreso, feliĉo de la homaro.

Zoltán Váli estas ankaŭ malnova esperantisto, agema movadano: tial ni deziru al li ankoraŭ multajn jarojn, sanon kaj sukcesan laborkapablon!

Mihály *Gergely*

Maljuna viro, 1960



La danĝero ankoraŭ ne pasis



La kuracbanejo RÁCZ ĉe la piedo de monto Gellért
(Foto: Sándor Gulyás)

D-ro Ferenc László

Budapeŝto, urbo de banejoj

5.

Kuracbanejo RÁCZ

Estus vera peko, se konigante la gravajn kuracbanejojn de Budapeŝto, ni preterlasus la Banejon RÁCZ.* Ĉe la norda flanko de la Gellért-monto staras tiu banejo, kiel gardisto, kiu atentas la ravan ĉirkaŭaĵon. Volonte venas ĉi tien almenaŭ por horeto kiuj sopiras je trankvileco kaj volas forigi sin el la urba murabundo, por iom revadi laŭplezure. Ŝajnas, ke la altirforton de la banejo influas grave — apud la bonega akvo — ankaŭ la ravo de la ĉirkaŭaĵo, kvazaŭ kuracilo. La Budapeŝtanoj rajte fieras pro tiu brila naturperlo, kiu donacas siajn trezorojn al ĉiuj, kiuj bezonas ĝin.

La kupoloj kaj basenoj de tiu tradiciplena banejo estas atestantoj de iamaj jarcentoj, ĝi estas elinter la plej antikvaj banejoj de Budapeŝto. La kuracefiko, de ĝia akvo jam estis konata de la patrujokupanta praa hungararo. En alia artikolo ni jam priskribis, ke la historio de la kuracbanejoj en Buda interplektiĝis kun la tieaj loĝlokoj. Ili estis fonditaj inter la montoj de Buda, ĉepiede de la Gellért-monto pro la vojoj, Danubaj trapasejoj, gravaj por komerco kaj strategio, sed grave kontribuis ankaŭ la tie trovitaj termoakvoj.



Antaŭ la enirejo de la banejo RÁCZ troviĝas memorŝtono inaŭgurita okaze de la 51a Universala Kongreso de Esperanto en 1966 en Budapeŝto. Ankaŭ la parko tie nomiĝas Esperanto-parko

Aerfoto pri la kuracbanejo RÁCZ

Laŭ skribaj mencioj, la historio de la Banejo RÁCZ fontas en la epoko de reĝo *Sigismundo* (Luksemburga).** Tiutempe ĝi jam bonege servis per matura bankulturo, kaj oni konis ĝin kiel „reĝa banejo". Dum regado de la elstara reĝo *Matiaso**** la banejo impete evoluis. La konstruaĵo de la banejo estis farita per luksa, eminenta gusto, kaj tegita koridoro kunligis ĝin kun la reĝa palaco por faciligi la vizitojn de la korteganoj..

Dum la turka okupado — simile al aliaj banejoj en Buda — ankaŭ tiu banejo akiris grandan popularecon, precipe pro religiaj kaŭzoj. La turkoj ŝirmis la belstilan konstruaĵon, eĉ pligrandigis kaj kompletigis ĝin. Tion bone pruvas en la nuna termobanejo la *subkupola baseno,* devenanta el la turka epoko, kiu restis en kontentiga stato eĉ post la granda sieĝo de Buda en j. 1686. Kompreneble dum la jarcentoj oni plurfoje transformis ĝin.

Post reokupo de Buda la imperiestra fisko prenis en sian manon ankaŭ la Banejon RÁCZ — samkiel aliajn banejojn — deklarante ĝin fiska posedaĵo. Sed imperiestro *Leopoldo la 1a* baldaŭ donacis la banejon al kapitano Károly *Pergassi,* post kies morto diversaj familioj sekvis lin kiel posedantoj.

El tiu periodo restis la nomo de la banejo. Tiutempe sur la Danubo jam viglis la komerca ŝiptrafiko ankaŭ en suda direkto, al Serbio. La haveno troviĝis ĉe la proksima Danub-bordo inter la Gellért-monto kaj la Fortikaĵo. Multaj komercistoj, metiistoj, ŝipanoj serbaj — kies hungara popolnomo estis tiam *rácz* — ekloĝis apude, formis tutan kvartalon, nomitan *Ráczváros* (Serba-urbo). La banejo situis ĉe l'rando de tiu *iama* urboparto do ĝi ricevis la saman nomon.

Ĝis 1860 la banejo ne multe evoluis, sed tiam János *Heinrich* aĉetis ĝin, kaj li komisiis feliĉe Miklós *Ybl,* faman hungaran arkitekton transformi la tuton. La banejo, kiun Ybl grandparte alikonstruis kaj ampleksigis, estis inaŭgurita en 1869.

La detruoj de la 2a mondmilito ne preteris la Banejon RÁCZ: la konstruaĵo grave difektiĝis. De 1945 ĝi funkciis nur post provizora riparado. Fine, en 1963 oni malkonstruis la ruiniĝintajn kaj plej difektitajn partojn, restaŭris kio estas arte valora monumento. Tiuj laboroj estis plenumitaj per escepta zorgo, relative rapide: en 1965 la rekonstruita banejo jam malfermiĝis — je granda ĝojo de la publiko.

La banejo, kiun funkciigas nun bona mastro, la Ĉefurba Banejdirekcio, situas bonege ankaŭ laŭ trafika vidpunkto: en Buda apud la Danubon gracie traarkanta Ponto Elizabeta, proksime al la jam priskribita Kuracbanejo Rudas. Ne nur de Buda, sed ankaŭ de Pest, transa flanko de la

Baseno el la turka epoko

Bankuvo — individua

ĉefurbo, eblas facile alveturi ĉitien per amasveturiloj aŭ per aŭtoj. Ne mirinde, ke la vizitantoj alvenas el la tuta ĉefurbo. Vere elstaran spektaklon prezentas al ili la baneja konstruaĵo, kun fronto rigardanta al la Fortikaĵo.

PER OKULOJ DE LA VIZITANTO

La gaston, kiu enpaŝas en la domon, atendas impresiga ejo, kie oni jam sentas, ke la banado estos ne nur utila, sed ankaŭ ĝuo. Du sekcioj troviĝas en la banejo: bankuvoj kaj termobanejo, sub la turka kupolo.

La *termobanejo* priservas samtempe 120 gastojn kun vestiĝkajutoj kaj ŝrankoj. La bangasto promenas tra ripozejo kaj viŝejo al halo, kie troviĝas 40 C° grada termakvo-baseno. De tie oni iras tra duŝejo kaj malsekvapora-kamero en la centran basenhalon, al la plej granda — okangula — baseno kun termakvo de 36 C°. Jam dum la turka epoko tio estis la centro de la banejo, kaj kun la supra kupolo ankaŭ nun ĝi spegulas orientecan efekton.

La muroj tie — same okangulaj — akomodiĝas al la basena formo. Ĉirkaŭe la etajn niĉojn fermas desupre turkecaj volboj. Ties plej altaj punktoj en 4 metra alteco subtenas la rondan kupolon, kiu atingas la dek metran altecon. Marmoro kovras la murojn, la pavimon fajancpladoj kanelitaj. En la 1,10 m profundan basenon kondukas ringo de marmorŝtupoj, servantaj ankaŭ kiel sidbenkoj.

Krom la centra baseno 3 etaj basenoj troviĝas en apartaj ejoj apud la kupolhalo. Apude estas la sekvapora-kamero.

La *bankuvo-sekcio* estas aranĝita laŭ la principo, ke la bangastoj disponu pri *plena komforto*. Ĉe la „atrium" tipa vestiblo kaj flanke de la koridoro viciĝas la banĉambroj, ĉiuj kun ampleksa, 650 litra aŭ pli granda kuvo, duŝo kaj ripozlito. Ĉion kovras marmoro aŭ „metlahi"-pladoj.

La banejo funkcias dum la tuta jaro. La du sekciojn ĉiutage vizitas 5—600 bangastoj. Krom la banado kompreneble eblas uzi ankaŭ aliajn servojn, i. a. medicinan kaj malsekan masaĝojn, pedikuron, friziston, por ne forgesi pri la malsatiĝintajn stomakojn kontentiganta bufedo en la vestiblo.

KION PREZENTAS LA AKVO DE LA KURACBANEJO RÁCZ?

La propra fonto de la banejo liveras 41,8 C° gradan varmegan akvon, kies kemian konsiston forte influas la fendiĝinta trias-epoka, dolomita, ŝtonaro de la Gellért-monto. Konforme al tio suprenvenas el la fonto alkala, kalcia-magneziahidro-karbonata, klorida, sulfata kuracakvo, kun radioaktiveco de 2,3 nC po litro.

Pro tia konsisto de la kuracakvo, en la banejo estas kuraceblaj degeneraj artiko-malsanoj, kronikaj kaj kvazaŭakutaj artritoj, hernio de inter-

vertebra disko, neŭralgioj, kalkmankeco de ostoj, k. a. Ĝiajn „junigajn" efektojn kaj sanigajn impulsojn — simile al la Banejo Rudas — povas senti ĉiuj, kiuj venas ĉi-tien por saniĝi.

La radioaktiveco de l'akvo ne atingas nocigan gradon, male ĝi bone efikas je la metabolo kaj kelkaj glandofunkcioj. Probable tio klarigas la „junigan" efekton.

LA MARGARET-INSULA KURACHOTELO „TERMAL"

La perlo de Budapeŝto, la rave intimetosa Margaret-insulo en 1979 riĉigis la vicon de siaj fierindaĵoj per la nova Kurachotelo „Termal". La gastoj de tiu hotelo havas la plezuron ĝui modernan hotelkomforton kaj aldone la freŝigan —sanigan kuracakvon de ĝia propra banejo, krom la naturbelecoj.

En la hotelo kun 400 litoj al ĉiu ĉambro apartenas banĉambro kaj loĝio kun grandioza panoramo al la Danubo. La bonstila aranĝo en la ĉambroj, la eleganteco de l'salonoj, restoracio kaj ceteraj, atestas pri la altnivela interna arkitekturo.

La kuracakvon por la hotelo liveras la tri termofontoj de l'insulo: tiu de la fama Sportnaĝejo (67 C°), kaj du putoj, boritaj sur la norda pinto de la insulo (37,5 kaj 35,5 C°).

Interne de la hotelo sur la teretaĝo troviĝas la naĝbaseno kaj la termakvaj basenoj, preskaŭ en la naturo medio, de kiu ili estas apartigitaj nur per vitromuro. Al la glata akvosurfaco de la 15,5 m longa naĝejo agrable kontrastas la dinamisma ŝtonplastikaĵo ĉe la basenfinoj. Se oni laciĝas dum naĝado, eblas freŝigajn trinkaĵojn preni ĉe eleganta trinktablo, rigardante samtempe la buntan floraron kaj imponajn arbojn de l'insulo.

Proksime de la naĝejo troviĝas la du termakvo-basenoj, krome la balast-terapia banejo kaj la baseno por „marŝo". La basenbordojn konturas verdaj plantoj, sur la muroj mozaikoj, en la sidniĉoj plurkolora ceramika kovraĵo igas la lokon intime plaĉa. Krom la bonega kuracakvo la gastoj laŭdezire utiligas ankaŭ kuracistan prizorgon, masaĝon, kaj aliajn servojn.

La ĝisnunaj spertoj pruvas, ke la nova kurachotelo sukcese ekzameniĝis, kaj bone plenumas la anticipajn esperojn. Kiu uzas ĝiajn servojn, foriras kun agrablaj impresoj, kaj volonte revenas alifoje.

KELKAJ RIMARKINDAJ KONSIDEROJ

Kiuj en banejoj volas resaniĝi, faras bone, se priatentas la konsiderojn deduktitajn de balneologiaj esploroj kaj observoj.

Estas konvene komenci per la observita fakto, ke dum la banterapio modifiĝas la reago de la homa organizo je la banefikoj. Ekzemple, post la oka aŭ deka bano la reakcio eventuale estos alia ol estis post la tria. Al la banterapio strikte apartenas la *efekto* de la stimuloj, ripetiĝintaj ritme kaj regule, kio rezultiĝas en la centra nervistemo, kaj pere de tio en la tuta „neŭrohormona" sistemo.

Estas komuna trajto de la banterapioj, ke ĝuste la modifiĝo de la reagemo helpas ĉesigi tiujn malsanojn, kiuj — laŭ historiaj spertoj — estas per banado kuracataj. Multaj fenomenoj de tiu reakcio-modifiĝo (iam estis nomata ankaŭ *agordiĝo)* similas al la sekvoj de la intesten-donitaj korpfremdaj albumin — aŭ sulfurinjektaĵoj. Tamen, okaze de banterapio *forestas* ĉia — la organismon negative influanta, ofte nekalkuleblajn konsekvencojn kaŭzanta — maldelikata interveno ĉar la fenomenoj post banado realiĝas nur pere de ripetitaj, unuope ne ekscitaj stimuloj, kvazaŭ fiziologie.

La banado povas atingi incitiĝon de la haŭtaj nervofinaĵoj kaj per tio rektan efikon je la nervsistemo. Ĝi povas produkti en la haŭto aktivajn

Enirejo de la Kurachotelo Termal



Inter grandegaj arboj, en pura aero, tamen preskaŭ en la centro de la ĉefurbo troviĝas Hotelo Termal sur la Margaret-Insulo

Krom hidroterapio multflanka kuracista prizorgado estas je dispono de la gastoj — eĉ dento-kuracado

materialojn, kiuj absorbite ekos reakciojn eĉ en fora loko de la korpo. Ankaŭ el la banakvo povas materialoj penetri en la organismon, kiuj kaŭzos specialajn efektojn, sendepende de la maniero de penetrado (radiumemanaĵo, sulfuro).

Videble la efektoj de la opaj akvoj sumiĝas el pluraj faktoroj, kio ebligas la plej variajn kombinaĵojn. Al la multspeca efekto de la kuracakvo aldoniĝas ankoraŭ la influo de la baneja medio, unuavice tiu de la klimato. Ankaŭ grave helpas la terapian rezulton ĉiuj, la nervosistemon atingantaj eksteraj influoj, ekzemple de la kuracejo, de la kuracistoj, flegistoj, kunlaborantoj kaj instalaĵoj en la banloko, de ties kultura, historia kaj socia medio.

Inter ĉiuj ĉi kompleksaj efikoj la gvidrolo apartenas nepre al la kuracakvo, de kiu dependas la tipa terapio en la koncerna banloko.

LA BANEJA REAKCIO

Banejon ofte uzantoj bone scias, ke dum la terapia banserio kutime manifestiĝas malagrablaĵoj, kuracindaj fenomenoj. Oni kredas ĝenerale, ke tio estas favora aŭguro, montranta ke la organismo de la bangasto reagas je la banado, konsekvence la kuracado iĝos bonrezulta. La tuta fenomeno, kio aperas ĉe la pli granda parto de la malsanuloj dum banterapio, estas nomata baneja reakcio aŭ krizo, ankaŭ banloka reakcio.

Tiuj malagrablaĵoj estas parte ĝeneralaj, parte en senpera ligo kun la kuracata malsano, kaj plejofte ili manifestas sin dum la 4.—8. tagoj de la terapio. La ĝeneralaj simptomoj: malbonfarto, laciĝemo, febleco, kapdoloro, sendormeco, nervozaj maltrankvilo aŭ incitiĝo, senapetiteco, foje pulsorapideco kaj malofte temperatur-altiĝo. Al la fenomenon ne konanta bangasto ŝajnas, ke ekestas ia nematuriĝinta malsano. Okazas foje, ke iamaj malsanoj aŭ traumatoj de la bananto, kvankam ili jam resaniĝis, aŭ cikatriĝis, denove manifestas sin por 1—2 tagoj per etaj doloroj.

Foje per tia reakcio evidentiĝas iu latenta, ĝis tiam simptomojn ne manifestanta malsano, kaj tiel eblas fari la ĝustan diagnozon. Laŭ la praktiko ne malofte okazas, ke lokaj simptomoj de la kuracenda malsano dum la etapo de la banejreakcio iĝas pli gravaj, ekflamas, alifoje doloroj jam ĉesemaj denove kreskas. Kompreneble ne temas pri banejreakcio, se la supraj simptomoj prezentiĝas dum terapio erare indikita, aŭ

farita per malĝusta dozado aŭ maniero. En tia okazo la simptomoj almontras efektive la malboniĝon de la paciento, la ekflamiĝon de la malsano. La vera banejreakcio estas nur portempa, pasas post 2—4 tagoj, antaŭe latentas, kaj rilatas al la banterapio.

La ofteco de la vera banejreakcio dependas de la kuracakvo-tipo, de intenseco de la aplikata terapio kaj kompreneble de la karaktero de la malsano. Iam ankaŭ la kuracistoj opiniis, ke por la bona kuracrezulto estas necesa la banejreakcio, kaj por atingi ĝin oni laŭgrade intensigis la terapion, kreskigante la daŭron kaj temperaturon de la bano, de la ŝlimpakado, ktp. La tiel okazintaj troaj reakcioj ofte ne helpis, sed kontraŭe, repuŝis la resaniĝon de la paciento. Tiaj ekstremoj de la dozado en la terapio estas eviteblaj, se antaŭ la ekuzo de kuracbanejo la klinika stato de la paciento estas zorge ekzamenita, kaj per laboratoriaj mezuroj ankaŭ la grado de la koncerna malsano. La baneja terapio devas akomodiĝi al tiuj konstatoj koncerne la dozadon.

La supre menciitaj, foje ŝajne ĝenaj fenomenoj probable instigas ĉiun saniĝemulon esti pacienca paciento, kiu toleras la ĝenojn por plejeble baldaŭ ree akiri — sub medicina kontrolo — sian sanan staton.

Tradukis: *E. Fenyvesi*

* Prononcu: raac.
** Vd. HV 1978/6. nro, p. 216.
*** Vd. HV 1979/1. nro, p. 16.

Naĝbasenoj de Hotelo Termal



Aleksandro Blok (1880-1921)

DEK DU

(DAŬRIĜO)

7.

Kaj denove kun pafiloj
Dek du viroj kune paŝas.
Nur la pala mortiginto
Jen vizaĝon sian kaŝas.

Ĉiam li plirapidigas
Siajn paŝojn en ekscito,
Sur la kolo forte ligas
Sian tukon en medito . . .

— Kial vi, amik', silentas?
Kaj malgaje tiel iras?
— Kio, Peĉjo, vin turmentas?
Ĉu pri Kanjo vi sopiras?

— Ho vi, kamaradoj miaj,
La knabinon mi ja amis . . .
Per la noktoj plej ebriaj
Mian vivon ŝi ornamis . . .

Pro petolo gajspirita
En okuloj ŝiaj belaj,
Kaj pro naskmakul' metita
Inter ŝultroj blankaŝvelaj

Pereigis mi malsprita,
agoj hastis tro kruelaj . . .

— Jen do, kion vi ekgurdis,
Ĉu turniĝis vi en inon?
— Kaj pro tio, ke vi murdis
Inversigas la animon?
— Tenu super vi kontrolon!
— Rekolektu vian volon!

— Tempo estas nun alia,
Ne por ploroj kaj ĝemado!
Ja pli peza estos nia
Ŝarĝo, kara kamarado!

Kaj hezite kvietigas
Peĉjo la rapidajn paŝojn,
Levi kapon sin instigas,
Ree gaja estas li . . .

Eh, eh,
Ja amuz' ne estas pek'!
Baru pordon vi per trab',
Ĉar hodiaŭ estos rab'!

Kaj malfermu kelojn, ĉar
Diboĉas nun ĉifonular'!

8.

Ho malĝoj-sufero!
Enuo teda,
mortiga!

Bone tempon mian
Uzos mi, uzos mi . . .

Bone verton mian
Gratos mi, gratos mi . . .

Bone senŝeligos
Semojn mi, semojn mi . . .

Per tranĉilo pikos
Bone mi, bone mi!

Flugu burĝo for pasere vi,
Trinkos sangon senespere mi,
Pro la amitin' malnova,
Nigrabrova . . .
Donu, Dio, pacon al animo ŝia . . .
Enue!

9.

La urba bruo jam ne sonas
Super malnova Neva-tur',
Kaj polican' plu ne spionas —
Promenu knaboj, kun plezur'!

Ĉe stratkruciĝo burĝo staras,
Levinte palton ĝis la frunt',
Kaj apud lia krur' najbaras
Preminta voston fava hund'.

La burĝo, kiel hund' malsata,
Kvazaŭ demando sen respond',
Kaj staras kun vostaĉ' premata
Post lia dors' malnova mond'.

Neĝventego akre blovas,
Hoj, blovad', hoj, blovad'!
Je kvar paŝoj eĉ ne povas
Vidi ion kamarad'!

Neĝo kirlas sin funele,
En kolon' leviĝis bele . . .

— Ho, ventego kia, Dio!
— Peĉjo, hej, sen fantazio!
Ĉu vin savis de malbon'
Origita sanktikon'?
Senkonscia vi, rezone
Nur meditu, pensu bone —
Ĉu ne sangaj estas manoj
Viaj pro la am' al Kanjo?

— Vi tenu paŝon revolucian!
Atentu malamikon nian!

Antaŭen, per paŝo persista
Popol' laborista!

11.

Kaj sen sankta nom' de Dio
ĉiuj dek du — bande
Iras kaj al ĉio
Pretas ne dubante . . .
Serĉas tuboj de pafiloj

Malamikon en silent'...
En stratetoj plej trankvilaj,
Kie sola blovas vent'...
Kaj dum paŝoj malfacilaj
Botoj dronas dum moment'...
Akrimponas
Ruĝa flag',

Paŝoj sonas
Jen kun klak',

Signon donas
Por atak'...
En okulojn neĝon ŝutas
Persekutas
Vento pista...

Antaŭen, la persista
Popolo laborista!

12.

...Fortapaŝe ili iras.
— Kiu estas enrifuĝa?
Nura vento maltrankvilas,
Ludas ĝi kun flago ruĝa...

Jen antaŭe — neĝ' amasa,
— Kiu sin en neĝo kaŝas?
Nur mizera hund' malgrasa
Post dek du obstine paŝas...

— Iru for ci, fava hundo,
Mi vin tikle bajonetos!
Kiel hundon, al profundo
Mi malnovan mondon ĵetos!

...Ĝi rikanas — lup' malsata —
Voston premis — ne postrestas —
Fremda hund' persekutata...
— Hej, rekriu, kiu estas?

— Kiu svingas ruĝan flagon?
— Vidu, jen mallumo kia!
— Kies rapideman vagon
Aŭdas nun orelo mia?

— Mi cin kaptos tutegale,
Cedu tuj, ja tio certas!
Do eliru senbatale,
Aŭ mi pafos, nun avertas!

Trah-tah-tah! — Sed nura eĥo
Resonadas apud domoj...
Kaj la sola neĝventego
Ridas kiel mokfantomoj...

Trah-tah-tah!
Trah-tah-tah...

...Tiel iras ili brave —
Poste — la malsata hund',
Kaj kun sanga flag' — antaŭe,
Tra ventego nevidebla,
Kaj per kugloj nevundebla,
Per surventa paŝ' gracia,
En ŝutperla mas' glacia,
En blankroza diadem' —
Antaŭ ili — Kristo mem.

El la rusa: N. Nekrasov
kaj B. Tornado

Kelkaj aĉetindaj libroj

La subaj libroj estas aĉeteblaj en Hungario ĉe la Libroservo de HEA, en ne-socialismaj landoj ĉe la Libroservo de UEA, en GDR ĉe la hungara kulturcentro en Berlino, en aliaj socialismaj landoj ĉe la landa asocio. Escepto estas Sovetio, kie ili estas aĉeteblaj ĉe la Estona Filio de ASE. Sovetaj esperantistoj sendu siajn mendojn al: K-do Johannes Palu, 200016 TALLINN, Solme 21, Estona SSR. La unua prezo estas en guldenoj; ĝi validas por ne-socialismaj landoj, la dua en rubloj, kaj ĝi validas kompreneble nur por Sovetio.

25 jaroj. Antologio de Belartaj Konkursoj 1951—1975. Redaktis W. Auld kaj V. Benczik. 208. p., 19 cm. Ilustrita. Ĝi enhavas la plej bonajn originalajn poemojn kaj novelojn, verkitajn dum la menciita periodo. Prezo: 13,80 ned. gld. (3,58 Rbl.)

V. Benczik: **Libro de romanoj.** 229 p., 19 cm. En tiu ĉi libro la aŭtoro prezentas detale la unuajn ses originalajn romanojn, verkitajn en la Internacia Lingvo, de H. Vallienne kaj H. A. Luyken. Ne nur studinda libro, sed ankaŭ agrabla legaĵo. Prezo: 15,— ned. gld. (3,58 Rbl.)

F. Molnár: **La knaboj de Paŭlo-strato.** 182 p., 19 cm. Mondfama junulara romano, plurfoje filmita. Ĝi povas plaĉi al ĉiuj, kiuj ankoraŭ memoras, kio estas fideleco al io. Prezo: 13,80 ned. gld. (3,58 Rbl.)

Zs. Móricz: **Malriĉaj homoj.** 36 p., 24 cm. Unu el la plej grandiozaj rakontoj de la mondliteraturo. Ĝi priskribas, kiel simpla soldato perdas sian moralan senton en la milito, kaj fariĝas murdisto, kvankam subjektive li restas senkulpa. Rekomendinda ankaŭ por komencantoj! Prezo: 2,40 ned. gld. (0,66 Rbl.)

G. Gárdonyi: **Steloj de Eger.** 64 p., 24 cm. Luksa bildrakonto, kun koloraj kovrilpaĝoj, pri la kontraŭturka rezistado en Hungario dum la 16-a jarcento. (Vd. specimenon en la ĉijara 3-a numero de HV!) Prezo: 6,— ned. gld. (1,10 Rbl.)

Glosoj por ĉi tiu numero:
pigra: malvigla, mallaborema
intui: kvazaŭinstinkte ekkonscii pri io
tenaca: elaste rezistema kontraŭ fortoj
skoldi: kolere riproĉadmoni
novalo: nekultivita plugtero

Szilárd Bálint

La sorto de la bankrabisto

István Barotai la fama ĉefurba advokato kun granda kontentiĝo forlasis la palacon de la plej supra tribunalo. Malsupreniranta li haltis en la mezo de la longa ŝtuparo kaj ekbruligis specialan bonodoran cigaredon. Dume li pensis pri la multaj manpremoj, pri la varmaj gratuloj, ricevitaj post la tribunala pritraktado, kiam li gajnis la proceson. La akuzatan viron oni absolvis, ĉar li, la elokventa fama advokato konvinkis la tribunalon, ke „In dubio pro reo" (okaze de dubo oni devas opinii senkulpecon), do, pro la manko de konvinko la suspektata viro iĝis libera.

La advokato havis iom senteblan lacecon kaj li decidis, ke dum kelkaj tagoj li ne akceptos novan klienton, sed li forveturos al la montoj por ripozi en iu kvieta arbara dometo. Kiam li volis sidi en la aŭton, iu tuŝis lian ŝultron:

— Sinjoro advokato, permesu al mi, ke mi diru kelkajn vortojn... neprokrasteblajn...

La advokato kun kolero returniĝis kaj malĝentile demandis:

— Kion vi volas de mi sur la strato?! — la advokato nur nun vidis, ke la alparolanto estas bela juna virino.

D-ro Barotai penadis venki sian nervoziĝon kaj senpacience demandis:

— Kio estas tiu grava afero?... Vi estus trovinta min, en mia kontoro dum la oficialaj horoj!

— Nun, tuj mi devas paroli kun vi... — obstinis la blonda virino. — Ni iru kune al tiu kafejo... mi petas vin, bonvolu akompani min tien...

La advokaton surprizis la trankvilo, kun kiu la virino komunikis la nekutiman peton. Dumtempe la kolero de la viro malaperis kaj kun rapida rigardo li okuladis la sveltan staturon de la virino. Nun jam li estis pli cedema kaj diris:

— Se la afero vere estas tiel grava, dum kelkaj minutoj mi estas je via dispono...

Ili kune trairis la straton, la virino trankvile paŝadis, la viro estis malkvieta, sed li iĝis ĉiam pli scivolema, tial li senintence sekvis la virinon. La advokato estis klera juristo, fama pledoparolanto, ĉi-maniere li bone konis la karakteron de diversaj homoj, tial li tuj vidis, ke la virino ne estas trompistino, nek serĉas aventuron. Verŝajne ŝi volas sciigi seriozan direndon.

En la kafejo ili sidiĝis ĉe iu kvieta angultablo.

— Mi esperas, ke mi ne faris eraron... ĉar vi estas d-ro István Barotai, la fama advokato?

— Jes, mi estas tiu... — respondis la viro.

— Do, vi estas tiu pledisto, kiu en la kriminala proceso de bankrabisto János Kis prenis fantastan monsumon? — demandis ŝi.

— La sumon de la honorario mi tute ne opinias fantasta — diris la advokato iom krude. — Cetere via informo estas ĝusta, se interesas vin, mi povas diri, ke la afero sukcesis, ĉar la akuzatan viron la tribunalo absolvis!

— Mi scias — respondis la virino — mi ĉeestis kiam oni anoncis la juĝon, tiam mi pensis, ke mi demandos vin, ĉu vi scias, kion vi faris, kiam vi liberigis tiun krimulon?

— Mi tute ne komprenas vin — ridetis la advokato — mi plenumis mian profesion je korekta maniero, mi gajnis la proceson de mia kliento, sekve mi meritis tiun honorarion!

— Jes, vi havas grandan respondecon, kiam vi elprenis tiun homon el la mano de justodonanta tribunalo. Nun mi rakontos al vi, kia estas tiu homo, kiun vi per via elokventeco liberigis!

La virino petis duminutan paroladon, tamen pasis preskaŭ unu horo, kiam ŝi finis la konfeson. La viro duonnarkotite aŭskultis, dume ruĝiĝis kaj paliĝis, unu cigaredon fumis post la alia, intertempe nekredeme indignis pri la krimo, kiun la blonda virino rakontis.

La advokato estis tenaca, sobra kaj flegma homo, tamen la historio de la malice planita bankrabado ankaŭ lin ŝancelis. Li pensis pri tio, ke lia pledoparolado estis falsinta kaj se la vereco poste malkovriĝos, tiam li perdos sian faman nimbon, eĉ lia profesio falos en danĝeron. Sed malrapide li reprudentiĝis, lia logikeco denove komencis labori kaj demandis:

— Vere, mi ne scias, ĉu mi povu kredi vian konfeson... ĉu vi diris la puran veron?!

— Mi ĵuras pri la vereco... eĉ mi havas multajn pruvaĵojn pri tio!

— Kara sinjorino, se ĉio ĉi estas prava, kial vi ne anonciĝis ĉe la tribunalo, kiel atestanto?

La virino ekstaris:

— Mi ne povis fari ateston, ĉar mi estas la edzino de tiu bankrabisto...

La advokato sidiĝis:

— Do, nun ni kion faru?!

— Tio estas simpla afero, malliberigu János-on, poste aranĝu nian eksedziĝan proceson... fine mi edziniĝos al vi, ĉar la sorto de la bankrabisto estas en niaj manoj.

Kara Leganto! Mankas la fino de tiu novelo, tial la redakcio petas vian helpon. Kiamaniere akiris konon la edzino pri la detaloj de granda bankrabado? Kion faris la fama advokato? Bonvolu sendi ne pli ol 20 tajpitajn liniojn. La plej bona solvo estos premiita, kaj la teksto aperos en H. V.

DAŬRIGO

de la rakonto kiu aperis en la n-ro 1979/6. Ĝia aŭtoro estas Eva *Jelinková,* Diviŝova 676, CS-67401 TREBIČ.

Al kiu apartenas Suzana?

En malgranda kafejo la tre inteligenta viro kun fermitaj okuloj aŭskultis la tragedion de Rozalia kaj diris:

— „Venu. Mi ion montros al vi."

Rozalia senforte ekstaris.

Ili iris tra sunplenaj stratoj ĝis infanĝardeno. Tie la sinjoro haltis:

— „Vidu, ĉi tie oni edukas forlasitajn infanojn. Ili povas ricevi ĉion necesan, krom la — patrina amo. Mi pensas, ke tiuj infanoj bezonas vin, sinjorino. Kaj ĉu vi povas foriri, se iu bezonas vin?"

— „Jes, sed . . ."

— „Sed, vi ja ne povas tutan vivon loĝi en hotelo, kaj vi ne povas manĝi belan Parizan aeron . . . Ĉio estas aranĝebla. Mi povas helpi al vi por komenco."

Rozalia preskaŭ ne sciis, kio okazas kun ŝi. Ŝi ne plu havis forton, por ion pensi. Malrapide ŝi iris kun la sinjoro, al hotelo Champagne, por preni siajn valizojn, kaj trovi novan loĝejon kaj — novan vivon . . .

En la sama hotelĉambro, el kiu ŝi foriris, sidis post kvin jaroj sinjoro Radnai kaj pensis pri sia perdita filino . . .

Post lia reveno hejmen komenciĝis por sinjoro Radnai ordinara ĉiutaga vivo.

Laboro kaj zorgado pri la domo kaj tagmanĝoj en restoracio . . . Vesperaj vizitoj en teatro kaj promenoj kaj ŝakludado kaj vintraj ekskursoj al montaro . . .

Foje en malgranda restoracio li hazarde interkonatiĝis kun sinjoro Kelen. La du viroj amike interbabilis, ĝis sinjoro Kelen adiaŭis, por iri renkonte al siaj edzino kaj filino. Kaj sinjoro Radnai neniam eksciis, ke fakte sinjoro Kelen iris renkonte ne al sia, sed al lia filino . . .

„KORESPONDI ne DEZIRAS"

Anonco: Bruno *Brunulo* (55-j.) deziras korespondi en tuta mondo kun neniu pri nenio.

Ĉu la sama ulo?

— Se mi volas vidi ĉarman viron, mi rigardas en spegulon.

Eta kuracistido rakontis

— Mia paĉjo kondukis la aŭton, kaj li lertege persekutis kaj postlasis ĉiujn aŭtojn. Poste nin persekutis iu motoristo, kun bela kasko. Li sukcesis antaŭi nin, haltigis paĉjon, kaj skribis al mia kolera paĉjo trankviligan recepton.

Ho, burokrato!

— Bonvolu tiun skribaĵon suprenporti sur la 4an etaĝon. Tie petu ankoraŭ unu stampon, kaj poste bonvolu konscii, ke via petskribo estis rifuzita!

Malburokrato

— Ĉu la taksio estas libera? Jes? Do bonvolu veturigi min al la alia flanko. Tie atendu, ĉar post unu horo ni revenos. Mi timas perpiede trapasi.

Ĉe arbeto en urbeto

— Laĉjo, se vi kisos min, ĉie aŭdiĝos ke mi ne lasis . . . Sed, se vi ne kisos, la tuta urbo diros, ke mi estis kisanta vin!

Ankaŭ ĉe urbeta arbet'

— Imagu sinjorino la ruzon de sinjoro Kruzo! Li edzinigas la fratinon de sia mortinta edzino, por ne havi denove alian bopatrinon . . .

El kiu milito?

En revuteatro kantas-dancas brilkostuma primadono, jam ne juna floro.

— Kiel ĉarma, kiel rava! — iu ekzaltas — ŝi ardas kiel bombo, vera seksbombo!

— Mi ne kontestas — kunulo reagas — nur ni eksciu, el kiu milito ŝi restis.

Verŝajne ne doktorido

Jam proksimiĝas la dua infano, kaj tial la familio decidas lokiĝi en pli vastan loĝejon. Tion aŭdante la unuenaskita fileto kapbalancas:

— Tio ne helpos, paĉjo. Li venos post ni ankaŭ tien!

Polica alvoko

„Atestantoj estas serĉataj, kiuj vidis, kien kuris la atestantoj de la karambolo."

Ankaŭ alvoko?

— Karulo, tiu ĉi maro memorigas min je nia gefianĉeco. Ĝi estas same senfina.

Poste — de la alia flanko

— Karulino, se mi ne havus ankaŭ aliajn virinojn, kiel mi povus rimarki, ke vi estas la plej admirinda?

Minijupo

La avino — rigardante la etetan jupeton sur la nepino:

— Se mi estus tiel vestita kiel knabino, vi nun estus ses jarojn pli aĝa.

La malforta sekso

estas pro la malforteco de la forta sekso rilate al la malforta sekso la pli forta sekso.

E. F.



HUNGARA DOLĈAĴINDUSTRIA ENTREPRENO

Georgi Mihalkov

La vitrino

La librovendejo, kie laboris Marta, troviĝis sur kruta kaj silenta strato kaj Marta estis la sola vendistino en tiu ĉi eta malhela vendejo.

La homoj malofte vizitis la librovendejon, sed Marta ŝatis la librojn, ŝatis sian laboron kaj tute ne koleriĝis kiam la vizitantoj nur trafoliumis aŭ trarigardis ian libron, denove remetis ĝin sur la breton kaj foriris, forgesante eĉ ĝisrevidon diri al la kara vendistino.

Matene preskaŭ neniu malfermis la pordon de la librovendejo, kaj Marta sidis sola kaj senmova apud la bretoj; ŝia hela vizaĝo kun bluaj okuloj, similis al bele ilustrita librokovrilo. Por Marta la matenaj horoj ege malrapide rampis, kaj por eviti la enuon ŝi legis aŭ ordigis la librojn en la vitrino. Tiu ĉi vitrino estis kiel granda scivola okulo al la strato kaj ofte, dum horoj, Marta silente staris ĉe la vitrino kaj rigardis la homojn, kiuj trapasis antaŭ la librovendejo. Enfermitaj en siaj problemoj kaj zorgoj la homoj tute ne rimarkis la librovendejon, sed estis iuj, kiuj por sekundo aŭ du haltis antaŭ la vitrino kaj trarigardis la librojn en ĝi. Pli ofte tiuj ĉi preterpasantoj estis lernantoj, studentoj, elegantaj fraŭlinoj aŭ simpatiaj junaj viroj kaj ŝajnis al Marta, ke iuj el ili, kiam rimarkis ankaŭ ŝin, milde ekridetis al ŝi. Tiuj ĉi ridetoj kvazaŭ varmigis la junan vendistinon, ŝiaj bluaj okuloj tuj ekbriletis kaj ŝiaj molaj vangoj rapide ruĝiĝis.

Marta estis provinca knabino kaj la vivo de la ĉefurbo, kiu pulsis de alia flanko de la vitrino, en unu sama momento timigis kaj allogis ŝin.

Nur de kelkaj monatoj Marta loĝis en tiu ĉi granda, brua urbo. Unu ŝia onklino, vidvino kiu ne havis infanojn kaj jam de jaroj vivis sola, invitis Martan loĝi kun ŝi. Kaj Marta tuj alvenis en la ĉefurbon kun eta valizo kaj multaj esperoj. Feliĉe ŝi rapide trovis laboron kaj ekamis la librojn en la malhela librovendejo, sed ĉi tie, en la granda urbo, ŝi sentis sin eĉ pli sola ol ŝia malsana kaj kaduka onklino.

Post la fino de ĉiu labortago Marta rapidis reveni hejmen, ĉar la onklino atendis ŝin por la vespermanĝo kaj dum la vespermanĝoj Marta estis kondamnita aŭskulti la tedajn kaj senfinajn rememorojn de sia kara onklino. Kaj nur kiam la onklino kontente ekdormetis antaŭ la televido, Marta povis iri en sian ĉambron kaj trankvile trafolumi iun novan libron, kiun ŝi alportis de la librovendejo.

Marta legis, sed ofte antaŭ ŝiaj okuloj estis la librovendejo, ĝia eta vitrino, la homoj, kiuj por sekundo haltas antaŭ la vitrino kaj kare ekridetas el Marta.

Marta sciis, ne, Marta kredis, ke unu inter tiuj junaj viroj certe iam eniros en la librovendejon kaj ili konatiĝos. Marta sciis, ke tio nepre okazos, se ne morgaŭ, ja postmorgaŭ aŭ en la venonta semajno. Kaj Marta kvazaŭ vidis, ke tiu longe atendita juna viro eniras en la etan librovendejon. Li eniras, sed ne tra la pordo, tra la vitrino . . . Li saltas, li rompas tiun ĉi fajnan, malvarman kiel glacio vitrinon, kaj kune kun li en la malhelan, sufokan librovendejon enfluos la suno kaj la urba bruo.

Karesita de siaj fraŭlinaj revoj, Marta ekdormas kun infana rideto. Sed verŝajne ŝi neniam komprenos, ke la homoj, kiuj por momento haltas antaŭ la vitrino, tute ne rimarkas ŝin kaj tute ne ekridetas al ŝi. Simple ili vidas sur la vitrino nur la respeguliĝon de siaj fizionomioj kaj stulte ekridetas al si mem.

Ordinare la homoj ŝatas rigardi sin mem en ĉiuspecaj speguloj.

István Nemere

La frenezulo

Tridek jarojn li iradis en tiuj samaj stratoj; ĉiam je la samaj horoj. Matene li iris unue en vendejon; ties odorojn jam bone konis lia nazo. Poste li foriris al oficejo, skribis. Kelkfoje levis sian kapon, denove skribis. Tagmanĝo, skribo, kaplevo, skribo, skribo, skribo.

Posttagmeze iris hejmen, atendis lin silento ĉambrodora, dolora nenio. Neniam li vidis supreniri, subeniri la sunon. Fermiĝis li inter betonaj muroj. Fojfoje elprenis malnovajn fotojn; nekonata, fremda knabeto inter fremdaj vizaĝoj en fremda domo. Li sciis: tiu estis li. Kaj sciis: tiu ne estis li.

Tridek jarojn lie enlitiĝis vespere sola, vekiĝis aŭrore sola. Dormis li surdorse kuŝante, ĉifinta sub si etajn, nevideblajn ribelojn. Komencis elfaladi liaj haroj, dentoj. En la ŝtuparejo konis li jam la ŝtupojn, ĉiujn, aparte.

Tridek jarojn elvenis matene, revenis vespere. Ĉiuj lin vidis, neniu lin vidis. Griza makulo sur la asfalto.

Foje aŭtune li elvenis tagmeze. Sen ŝuoj, en nokta ĉemizo, kun ombrelo. Haltis ĉe elirejo, el fremda fenestro deprenis florujon. Blankan krizantemon. Malfermis la granda, nigran ombrelon, ekiris meze de la strato. Ĉiuj rigidiĝis sur la trotuaroj. Infanoj kuris, post li, aŭtoj obstrukciiĝis. Li nur iris.

„Frenezulo" — diris oni ĉiam pli laŭte — „frenezulofrenezulofrenezulofrenez . . ."

La kriantoj ĉiuj iradis sur tiuj samaj vojoj, ĉiutage. Kelkiuj kvin, aliaj dekkvin, dudek jarojn. „Frenezulo" — ili kriis kaj sentis sin strange malplenaj, kiam vespere ili enlitiĝis.

Kaj ili ne povis endormiĝi.

MIYAMOTO Masao

Al Kim Jiha*

Mi havas ideon apartan for de vi,
vi havas ideon apartan for de mi.
Mi tamen estimas vian liberon paroli,
vi tamen estimus mian liberon paroli.
Sen tia princip' fundamenta
mi vivis longdaŭre,
vi vivas longdaŭre.
En la prizono ostofrostiga vi tremas.
En ĝi glaciiĝas ĉio — la libero
via kaj la korea.
Tiun glacion mi iam mem spertis,
tian glacion vi nune mem spertas.

Spitu la katenon!
Spitu la potencon!
Ĉu vin ne kuraĝigas nia Puŝkin?
Atendas multaj vian savon.
Se l' ĉenoj falos liberiĝe,
amikoj al vi plej feliĉe
*alportos la malnovan glavon.***

Jes, la glavon de l' libero!
Kaj neniam vi forgesu enkalkuli,
ke inter l' amikoj troviĝas
ankaŭ mi, poet' japana kaj internacia!

* *Nuntempa sud-korea poeto, sidanta en malliberejo.*
***El la poemo „Al la dekabristoj en Siberio" de Puŝkin.*
(Traduko de K. Stelov.)

S 150 E ***

HŰTŐGÉPGYÁR
JÁSZBERÉNY

Paĝo de komencantoj

Letero al mia amiko

Kara Amiko! Danke mi ricevis vian leteron. Estis bone legi vian skribaĵon, ĉar el ĝi mi kaj eksciis, ke vi estas en bona sano, kaj ke vi ne forgesis min. Bona aĵo estas la vera amikeco. Mi esperas, ke vi ankaŭ estonte skribos al mi kaj mi ne devos atendi longe vian leteron. Esperantistoj ĉiam volonte skribas leteron unu al la alia.

Ĉe' ni nun sekvos malfacilaj tagoj, sed mi esperas, ke post tiuj mi havos eblon ripozi.

Mi ankoraŭ ne skribis al vi pri nia hundo. Ĝi nun estas sepjara kaj volonte ludas kun mi. Vere, mi ne ĉiam havas tempon por ludi kun ĝi, tamen mi faras ĉion, por ke ĝi fartu bone ĉe ni. Kompreneble ĝi ŝatas ankaŭ promeni kaj se mi ne havas sufiĉan tempon por tio, mia patro promenas kun ĝi. Ĝi ŝatas manĝi ĉion, tamen pleje ĝi manĝas dolĉaĵojn.

Nun mi finas mian leteron kaj mi atendos vian respondon.

Amike salutas Vin
Steĉjo,

Raporto pri mia vojaĝo

Mi havas maljunan onklinon en Rumanio, en urbo Lugoĵ. Mia anklino havas 75 jarojn, tamen ŝi estas sana. Ŝi ofte vokis min, ke mi vizitu ŝin en ŝia hejmo. Volonte mi pretigis min por vojaĝi. Jes, antaŭ la vojaĝo, mi havis multe da farendaĵoj, tamen fine alvenis la tempo de la ekiro. Mi vojaĝis per internacia rapidvagonaro, nokte, kaj pro tio mi ne povis dormi sufiĉe. Sed mi vojaĝis volonte, ĉar mi scis, ke mia onklino delonge atendas mian viziton.

Matene la trajno alvenis, kaj ni feliĉe rigardadis unu la alian, ĉar mia onklino delonge ne vidis min. Poste sekvis iom da ripozado en la logeĵo de mia onklino. Estis bone por mi iom ripozi en lito, ĉar la longa vojaĝo faris min tre laca. Eĉ manĝi mi ne volis, nur ripozi en la gastolito. Post la matenmanĝo mi rapide pretigis min por ĉirkaŭrigardi la urbon. Lugoĵ estas malgranda urbo apud la bordo de la rivero Timiŝ. Mia onklino venis kun mi, kaj ŝi montradis la vidindaĵojn de la urbo. La loĝkonstruaĵoj estas belaj kaj en ili loĝas multe de homoj.

Post la tagmanĝo ni eksidis en la ĝardeno, kaj paroladis pri la antaŭaj tempoj. Mia onklino estas feliĉa, ke post longaj jaroj ŝi nun povis vidi min.

Mi havis unu semajnon, kiel liberan tempon, sed la tagoj kuris unu post la alia kaj jen, alvenis la tempo de mia forvojaĝo.

Por hejmenveni, mi elektis alian vojon, ĉar mi deziris viziti dumvoje ankaŭ mian iaman naskiĝurbon Kolozsvár. Tiu urbo (nun Cluj-Napoca) estas bela, granda urbo apud la bordo de la rivero Samoŝ. Mi restis du tagojn en la urbo kaj dum mia promenado mi sukcesis trovi mian iaman naskiĝdomon. Post okhora vojaĝo mi alvenis en Budapeŝto, kaj la sekvajn tagojn mi povis multe paroli al mia familio pri mia vojaĝo.

Bulgara Esperantisto—en nova vesto

Abonu la revuon „Bulgara Esperantisto" — organon de Bulgara Esperanto-Asocio, kiu revuo estas unu el la plej malnovaj Esperanto-periodaĵoj en la mondo. Ĝi havigos al vi interesan kaj allogan legaĵon en Esperanto. Aparte grave: pere de ĝi vi havos abundajn informojn pri la vivo kaj agado de la esperantistoj en Bulgario, la lando, kie la Esperanto-movado tiel bonsukcese marŝas antaŭen. Kaj tio, kredeble, pliriĉigos viajn spertojn.

La revuo aperas ĉiumonate en formato 20x30 cm, ĉiu numero sur 20 paĝoj, do por la tuta jaro 240 paĝoj. La abonprezo estas 4 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La sumojn por abono bv. sendi al: DSK Blagoevski rajon, konto 185/1052 de Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, Bulgario. Aparte sendu leteron al la redakcio (Sofio, Pk. 66) kun via adreso.

Vizito ĉe mia amiko

Hieraŭ mi vizitis mian amikon, kiu estas kuracisto. Li havas 36 jarojn. Facile mi trovis lian loĝejon, ja li diris, ke li loĝas en la strato Rákóczi, kaj li transdonis al mi sian adreson.

Kiam mi alvenis al ili, la tuta familio sidis kaj atendis min en la meza ĉambro de la loĝejo.

Mia amiko havas junan edzinon kaj du infanojn. Mi transdonis la dolĉaĵojn, kiujn mi kunportis por la infanoj. Post la salutoj ankaŭ mi sidiĝis kaj ni komencis paroladi. Mia amiko rakontis pri sia ĉiutaga laboro. En la malsanulejo, kie li laboras, multaj malsanuloj atendas la resaniĝon. Dum ripoztagoj oni permesas, ke la negravaj malsanuloj iru hejmen kaj vizitu sian familion. Kompreneble, post la ripoztagoj ili devas reiri en la malsanulejon por povi resaniĝi. Mia amiko multe parolis pri la ĉiutaga vivo de la malsanulejo.

Mia vizito estis agrabla ĉe la amikeca familio, kaj ofte mi memoris pri nia renkonto.

István *László*

LETERKESTO

Jacqueline Lorent kaj la E-Grupo Meĥleno, B. *Keerbergen.* La dezirojn por sukcesoj de HV, nia redakcio de via amika rondo kore akceptas. Ni deziras al ni, ke HV siaflanke konvene helpu en via poresperanta agado, kaj samtempe ĝi plezurigu vin! Neniam ni forgesas, ke Eo interligas la bonintencajn homojn tra la mondo!

Naŭmo A. Kopmanis, Daugavpils, SU-Latvio: Pri Andreo *Cseh* prezentis informojn la nekrologo en HV 80/6 nro, p. 217. Pri la Cseh-metodo ne troviĝas speciala faklibro, nek HEA eldonis libron pri ĝi. Tia informo eble devenis de ia intermikso kun la *Gvidlibro por supera ekzameno.* La eldonaĵoj en Sovetio estas nuntempe aĉeteblaj pere de la Estona Filio de ASE, ĉe k-do Johannes *Palu,* 200 016 Tallinn, Solme 21. Estona SSR. Bv. mendi tie!

Sergio Tratti. I, Rimini: Via memoro estis ĝusta: Ferenc *Deák,* la hungara politikisto, partiestro, kiu gravege kontribuis al la kompromiso kun la Habsburgoj (1867) — HV 80/1. p. 8. — havis jam en 1848 gravan rolon. En la revolucia — unua — registaro de grafo Batthyány la justicministro estis Deák, post longa opozicia agado. Cetere, pro la kompromiso de 1867 estiĝis vivlonga antagonismo inter li kaj la nekompromisema Kossuth.

D-ro J. Kondor, FRG, Neuwied: Ni dankas al vi fotojn, kiujn vi faris vizitante la karmemoran Andreon Cseh — ni povis elekti el ili por publikigo en nro 79/6. *Ni neniel miras,* ke inter niaj legantoj troviĝas multaj, kiuj serioze respondadas al „soifaj" E-radiostacioj. Ni volonte publikigas la nomojn de la distingitaj korespondantoj, se la *redakcioj de la E-dissendoj,* eventuale mem la distingitoj informas nin.

Ludoviko Csonka, H, Budapeŝto: Ni klopodos, konforme al via instigo, pli multe okupiĝi laŭ la eblecoj pri la radiofonio en Eo. Tio koncernos kompreneble ne nur la radiostaciojn, sed ankaŭ la *amatorajn radiojn,* tamen konsciu, ke tio plejparte dependos de la informoj, kiujn la amatoroj multope sendos al nia redakcio, ebligante per tio interes-indan resumadon. Ni gratulas ankaŭ al vi, kiel *distingita korespondanto de Radio Varsovio.* Tiel plu . . .

Vladimir Baŝkin, SU, Kiev: En la hungaraj nomoj (kaj vortoj) Abonyi, Kapitány, k. c. la literparo NY estas prononcenda kvazaŭ NJ, do: abonji, kapitanj. Simile Gergely: gergelj. Sed esceptas (nur en nomoj) Vörösmarty, k. s.: vöröŝmarti. La Ö estas same prononcenda, kiel en la franca artikolo LE, la dana Ø en Angström aŭ la latina OE en Phoebus Apollo, aŭ en la nomo de Goethe.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: **Georgi Mihalkov**

MALRIĈAJ HOMOJ DE ZSIGMOND MÓRICZ

„Malriĉaj homoj" estas unu el la plej karakterizaj kaj impresaj verkoj de talenta hungara verkisto Zsigmond Móricz.

1. Kiom da tagoj da libertempo havas la soldato?
2. Kiel nomiĝas la filino de András Szabó?
3. Bonvolu daŭrigi la sekvan frazon:
„Ŝi rigardis, kun plora doloro rigardis la okulojn de ŝia . . ."

La limdato por la sendo de la respondoj estas unu monato post la apero de la revuo.

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Cefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,— al eksterlando por unu jaro 78,— forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. — 80. — 73320. —Nyírségi Nyomda Responda gvidanto: Zoltán Jáger, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

Dum ekskurso, en teo,
ĉe sporto, en limonado



Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1725 Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefono: 476-716, 573-088

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

BÁV

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért

10 marta 1981